godfathership, baptopatreco.
Godhead, Di'eco-aĵo.
godless, malpia.
godlessness, malpieco.
godliness, pi'eco, sankt'.
godly (holy), sankt'a-e; (of God), dia; (pious), pi'a-e, sankt'a-e.
godmother, baptopatrino.
godmothership, baptopatrineco.
godparentship, baptaneco.
"**gods,**" **the** (theatre), senmortuloj.
godsend, trovaĵo.
godson, baptofilo.
Godspeed! Dioprosperon!
goes without saying, this, tio ĉi parolas de si mem.
goffer, to, vaflumi, foldi.
going, a, vojir'o-ado.
—— **as far as, a,** ĝisiro.
—— **away, a,** de'iro, for'.
—— **back, a,** reiro.
—— **on, a,** irado.
—— **out, a,** eliro.
—— **over to,** transiro.
——, **to be** (mech.), funkciadi.
——, **to set,** ir'igi, funkci'.
—— **up, a,** supreniro.
gold, or'o-a.
gold-bearing, or'hava-entena.
gold-beater's skin, baŭdruĉo.
gold-brocade, orŝtofo.
gold-colour, orokoloro.
gold-coloured, orokolora.
gold-field, or'ejo-minejo.
gold-hammer (orni.), oriolo.
gold-plating, origaĵo.
gold-washer, orlavisto.
gold-work (object), oraĵo.
golden, or'a-eca-kolora.
——, **to become,** oriĝi.
goldfinch, kardelo.
goldsmith, oraĵisto.
golf, golfi'o-a.
golf-links, golfiejo, (golfi)ludejo.
goloshes, galoŝoj.
gondola, gondolo.
gondolier, gondolisto.
gone, el'irinta, for'.
gone! (auction), aljuĝita! alvendita!
—— **by** (the time), antaŭa (tempo), pasinta (tempo).
—— **for ever** (adj.), senrevena.
gonorrhœa, gonoreo.
good, bono, bonstato, bona, bone! pia; (enjoyment), ĝuado.
——, **a becoming,** piec'iĝo, bon', sankt'.
—— **condition, in,** bonstate.
—— **deal, a,** multo.
—— **enough to . . . to be,** voli afable . . .
—— **enough? will you be,** bonvolu, ĉu vi bonvolos . . . ?
—— **for,** valora.
—— **for, to be,** taŭgi.
—— **Friday,** Granda (antaŭpaska) Vendredo.
—— **health,** (bon)sano, bon'statofarto; fartu bone!
—— **health, to have,** (bon)sani, bon'stati-farti.

good humour, bonhumoro, gajeco.
—— **person, a,** bonul'o-ino.
—— **sense,** delikata juĝo.
—— **thing, a** (pleasantry), bontrovo.
——, **to be** (*or* **become**), boniĝi.
——, **to be so,** havi bonecon, voli afable.
——, **to do,** bonfari.
——, **to make,** (re)bonigi, ripari; (compensate), kompensi por.
—— **wish,** bondeziro.
good-bye, adiaŭ, iru kun Dio!
—— ——, **to say,** diri adiaŭ, adiaŭi.
good-day! to say, diri bonantagon.
good-for-nothing, sentaŭg'a-ulo.
good-hearted, bonkora.
good-humoured-ly, bonhumor'a-e.
good-looking, bonvidiĝa.
good-natured-ly, bon'anim'a-e, bonkor'a-e.
good-tempered-ly, bonhumor'a-e.
goodness, boneco.
—— **of heart,** bonkoreco.
—— **to . . ., have the,** havu la bonecon. . . .
goods, apartenaĵo-j, posedaĵo-j; (for sale), komercaĵoj; (possessions), hav'aĵoj, posed'.
——, **dry-,** sekaj komercaĵoj, sekaĵoj.
——, **ex-warehouse,** komercaĵo kuŝe en nia tenejo.
——, **fancy-,** galanteria komercaĵo; (toilet), galanterio.
—— **for sale, to expose,** elmeti komercaĵojn.
—— **forwarded,** send'aĵo, eksped'.
——, **household** (furniture), doma meblaro.
——, **in** (possessions), havaĵe.
——, **job-,** fikomercaĵo.
——, **list of** (inventory), entrovaĵo.
—— **train, by,** malrapidire, per komercaĵa vagonaro.
goods-station, komercaĵa stacidomo.
goodwill, bonvolo; (com.), klientaro kaj bonvolo.
goose, ansero.
——, **larded,** lardita ansero.
——, **male,** anser-viro.
——, **tailor's,** gladilo (tajlora).
gooseberry, gros'o-a.
gooseberry-bush, gros'ujo-arbeto.
goosefoot (mountain spinach), atriplo.
gore (blood), sang'o-aĵo; (cloth), tuktriangulo.
——, **to,** kornpiki, piki per la kornoj.
gorge (glen), intermonto; (gullet), glutejo; (throat), gorĝo.
——, **to,** manĝegi, supersatigi sin.
gorgeous-ly, lukseg'a-e, beleg'a-e, parad'a-e.
gorilla, goril'o-a.
goring, a wound from, kornovundo.
gormandize, tro multe manĝi, manĝegi.
gorse, ulekso.
goshawk, akcipitro.
gosling, anseridо.
gospel, evangeli'o-a.
gossip, babilaĵo; (person), babilemul'o-ino.
——, **to,** babili.
got (begotten), naskigita; (possess.), posed'ita, hav'; (received), ricevita.
——, **have** (possession), havas.
—— **on** (wore—of clothing), portis.
—— **to** (reached), atingita.
Gothic, gota; (arch.), gotika, pintarkaĵa.
—— **arch,** ogino, pintarkaĵo.
gouge, ronda čizilo.
—— **round, to,** čirkaŭčizi.
——, **to** (of the eye), elpremi.
gourd, kukurbo.
——, **drinking,** (kukurba) boteleto.
gourmand, manĝegulo.
gout, podagro, artrito.
goutiness, podagr'eco-emo.
gouty, podagr'a-eca-ema.
—— **person,** podagrulo, artritulo.
govern, to, regi; (a pupil), guverni; (direct), direkti.
governess, guvernistino.
governing body, estraro.
government (body), registaro; (province), gubernio; (ruling), regado.
——, **form of,** regformo.
——, **municipal,** urbrego.
government-al (adj.), estra, reg'ada.
governor, (educative), guvernisto; (provincial), gubernestro; (regulator), reguligilo; (ruler), reganto.
gown, robo; (clergyman's), pastra robo, talaro.

gown, dressing-, negliĝa vesto, nokta surtuto, tualeta vesto.
——, **sheepskin morning-**, ŝafa pelto.
——, **sleeveless**, sarafano.
gowned, robita, vestita, togita.
grace, favoro, kompato, pardono, bonvolo, Di'subteno-helpo-favoro; (charm), ĉarm'o-eco; (of structure *or* form), gracio.
——, **days of**, respektotagoj, limtempaj tagoj.
—— **in ornament**, ornamgracio.
—— **of God**, Di'favoro-helpo-subteno.
——, **to take with a bad**, malbone akcepti.
——, **work of** (relig.), Difarado.
graceful-ly (carriage), graci'a-e, belmov'a-e.
gracefulness (form), gracieco.
grace-note (mus.), koloraturo.
gracious-ly, bonfar'anta-e, bonkor'a-e, afabl'a-e, bonmanier'a-e; (forgiving), pardonem'a-e.
graciousness, favoremeco, pardonemo, bonkoreco.
gradation, grad'eco-igo-iĝo.
grade, grado; (rank), rango.
——, **according to**, laŭgrade.
——, **first** (*or* **elementary**), unuagrada.
——, **to**, grade aranĝi, gradigi.
graded, that which cannot be, negradigebla.
gradual-ly, grad'a-e, laŭgrad'a-e.
graduate, gradiĝinto, gradulo, internulo.
——, **to**, gradigi; (university), gradatingi.
graduation, grad'igo-iĝo; (markings), gradig'aĵo-aro.
graft, inokulaĵo, greft'o-aĵo.
——, **to**, grefti, inokuli.
grafting, greftado.
grafting-knife, greftilo.
grain (general), greno; (of wheat, etc.), grenero; (seed), semo; (small piece), grajno; (wood), fibrarango.
——, **against the**, kontraŭvol'a-e.
—— **of sand**, sablero.
——, **to** (paint), vejni.
grained, grenforma, vejnita.
grains, brewer's, rekremento.
gram, gramme, gram'o-a.
grammar, gramatik'o-a.
grammar school boy, gimnaziano.
grammarian, gramatikisto.
grammatical-ly, gramatik'a-e.
granary, garb'ejo, gren'; grentenejo.
grand-ly, boneg'a-e, beleg'a-e.
grand (imposing), grandioza.
—— **duchy**, granda duklando.
—— **duke**, granda duko.
—— **juryman** (*or* **judge's assessor**), akabeno.
grand-nephew, pranevo.
grand-niece, pranevino.
grandchild, nep'o-ino.
grandchildren (both sexes), genepoj.
—— **of brother or sister** (both sexes), pragenevoj.
granddaughter, nepino.
grandee, grandsinjoro, grandrangulo.
grandeur, grandeco, majest'o-eco, pompo.
grandfather, avo.
——, **great-**, praavo.
——, **great-great-**, prapraavo.
grandiloquent, fielokventa.
grandiose, grandioza.
grandmother, avino.
——, **great-**, praavino.
——, **great-great-**, prapraavino.
grandmotherly, avin'a-ec'a-e.
grandparents, geavoj.
grandsire, avo, prapatro.
grandson, nepo.
——, **great-**, pranepo.
——, **great-great-**, prapranepo.
grange, biendom'o-aro.
granite, granit'o-a.
granitic, granit'a-eca.
grant, donitaĵo, difinitaĵo; (gift), donaco (solena); (permission), permeso.
——, **money-**, helpa mono.
——, **to** (a request), plenumi peton; (allow), permesi; (give for), pordoni, prodoni; (hear favourably), plenumi.
granted, konsentita.
——, **not**, nekonsentita.
——, **take for**, akcepti kvazaŭ ceditan, preni kiel konsentitan.
granular, grajn'a-eca
granularity, grajneco.
granulated, grajn'a-simila.
—— **metal** (shot), kugletaĵo.

granule, granolo.
—— **cells** (anat.), granolgraso.
grape, vinber'o-a.
grape-basket, dorsakorbo.
grape-bearing, berar'a-hava, vinberar'a-hava.
grape-gathering, vinrikolto.
grape-harvest, an abundant, vinbersufiĉego.
grape-like, vinbersimila.
grape-seller, vinbervendisto.
grapes, to harvest the, vinborikolti.
grapeshot, kuglaro.
graph (math.), grafikajo.
graphic representation (math.), grafikajo.
graphically, to represent (math.), grafiki.
graphite, grafit'o-a.
graphologist, grafologo.
graphology, grafologio.
graphs, an integral by (math.), integralo laŭkurba.
grapnel, hoko, ankroto, kroĉilo.
grapple, to, (man)kapti, hokekapti, eklukti.
grappling, man'kapto, hoko'; eklukto.
grappling-irons, kroĉilo.
grasp, a, premo.
——, **to,** premkapti, promteni; (comprehend), kompreni, percepti.
grasping, act of, (comprehension), kompreno, percepto.
grass, herb'o-a.
——, **blade of,** herboto, herbero.
grass-plot, herbejeto.
grasshopper, akrido; (cicada), cikado.
grassy, herb'a-oplena-oriĉa, herboprodukta.
grate, krado.
——, **fire-,** fajrujo.
——, **to,** raspi, froti, grati, deskrapi; (make a scraping noise), knari.
grated particles, grat'aĵo, skrap'.
grateful-ly, dankem'a-e.
grater, raspilo, skrapilo.
gratification, kontent'igo-iĝo.
gratified, kontent'a-igita.
gratify, kontentigi, fari plezuron al, indulgi, komplezi.
grating, krad'o-ajo; (lattice), palisplektajo; (network), retajo.
grating, a (noise), akra sonado, knarado, akra sono.
gratis, senpage.
gratitude, dankeco.
gratuitous-ly, senpag'a-e; (without cause), senkaŭz'a-e.
gratuitousness, senpageco.
gratuity, mondonac'o-eto.
grave-ly, serioz'a-e.
grave, tombo, ĉerkujo; (important), grava; (mien), gravamiena.
——, **to,** gravuri.
gravedigger, tombisto.
gravel, ŝtonetajo, sablajo.
gravel-pit, sablejo.
gravelly, ŝtonaja, ŝtonet'a-oca, ŝton'a-hava-plena.
graver (person), ĉiz'isto, gravur'; (tool), gravurilo.
gravestone, tomba ŝtono.
gravitate, to, gravitadi.
gravitation, gravitado, altiriĝado.
gravity (importance), graveco; (seriousness of mind), seriozeco; (weight), (multe)pezeco.
——, **centre of,** pezocentro; (math.), baricentro.
——, **force of,** pez'intenseco-potenco.
——, **specific,** rilata pezo, speciala pezo.
gray, griza (*see also* **grey**).
—— **hairs, having some,** grizeta.
graze, to, paŝti sin; (pasture), paŝtiĝi, manĝi herbon; (scratch), defroti, degrati; (touch), tuŝeti.
grazier, bovedukisto, paŝtisto.
grazing (pasturage), paŝtajo.
grazing-place, paŝtejo.
grease, gras'o-ajo; (on clothes, etc.), grasa malpurajo; (rendered lard), porkograso.
—— **out, to take,** sen'oleigi-grasigi.
——, **to,** grasoŝmiri; (spot), grasmakuli; (with tallow), sebi.
greasiness, graseco.
greasy, graseca, gras'malpura-uma, grashava; (oily), oleeca.
great- (prefix, as great-uncle), pra-.
great-ly, grand'a-e; (in mind), nobl'a-e.
great-coat, surtuto, supervesto, palto.
greater, pligranda.
—— **by, is** (math.), ploje superas.

greater number, the, (la) plimulto.
—— **part, the,** (majority), la plimulto.
——, **to become,** pligrandiĝi.
greatest, the, la plej granda.
greatness, grandeco; (of soul), grandanimeco; (rank), altrango; (size), grandamplekso.
grecolatin, greklatina.
greed, avideco, manĝegemo.
greed'y-ily, avid'a-e.
greedy, not, neavida.
green, verda; (colour), verdo.
—— **again, to become,** reverdiĝi.
——, **apple-,** pomverd'o-a.
—— **linnet,** liguro.
——, **parrot-,** helverda.
——, **sea-,** marverda.
——, **to become,** verdiĝi.
——, **to show itself,** verdi.
——, **to turn,** verdiĝi.
green-sickness, klorozo.
greenfinch, liguro.
greengage, renklodo.
greengrocer's shop, frukto'butiko, legom'.
greengrocery, legomfruktajo.
greenhorn, novic'o-ulo.
greenhouse, varmejo (kreskaja).
greenish, dubeverda.
greenness, verdeco.
greensward, herb'okovro-aro.
greet, to, saluti.
greeting, salut'o-ado.
gregarious, societ'ema, ar'.
grenade, grenado.
——, **hand-,** mangrenado.
grenadier, grenadisto.
grey, griza (*see also* **gray**).
—— **hairs,** grizajo.
——, **slate-,** ardezogriza.
——, **to grow,** griziĝi, grizhariĝi.
grey-bearded, grizbarba.
grey-black, duonenigre griza, duonblonde griza.
grey-haired, grizhara.
greybeard, grizbarbulo.
greyhound, kur'hundo, rapid'; leporhundo.
greyish, grizeta, duonenigre griza, duoneblonde griza, dubeblanka.
griddle, bakplatajo.
gridiron, kradrostilo.
grief, malĝojo, bedaŭr'o-ego; (mourning), funebro.
grievance, plendmotivo.
grieve, to (int.), malĝoji esti malgaja; (trans.), malĝojigi; (vex), ĉagreni.
—— **with, to,** kondolenci.
grieved (pained), animdolorata.
——, **to be,** ĉagreniĝi.
grievous-ly, dolorig'a-e, malĝojig'a-e, kompatelvek'a-e.
griffin, grifo.
grill, to, kradrosti.
grim-ly, malafabl'a-e, malrid'a-e; timig'a-e.
grimace, grimaco.
——, **to make a,** grimaci.
grime, malpurajo, fulgo.
grimy, fulg'a-eca, malpura.
grin, grimaco.
——, **to,** grimaci, montri la dentojn.
grind, to cause the teeth to, grincigi la dentojn.
——, **to** (bray), pisti; (mill), mueli; (rub away), disfroti; (the teeth), grinci.
grinder (mill), muelisto; (sharpener), akrigisto; (tooth), vanga dento.
——, **knife-,** akrigisto.
grinding, muel'ado, akrig'.
grindstone (mill), muelŝtono; (to sharpen), akriga ŝtono.
grinning, grimac'a-anta, rikan'a-anta.
grip, manprem'o-ego, tenego; (drain), defluil'o-eto.
gripe, to, man'preni-premi-teni; prem'egi, ten'; kolikigi.
gripes, koliko, ventrodoloro.
griping (mean), trošparema.
grippe, the, gripo.
grisly, tim'iga, terur'; malbelega.
grist, muelajo; (provision), provizajo.
gristle, kartilago.
gristly, kartilag'a-eca.
grit (gravel), ŝtonetajo, sablego.
grit-stone, sabloŝtono.
gritty, ŝton'a-hava-plena; sableca.
grizzly, griseta.
groan, ĝemo.
——, **to,** ĝemi.
groat (coin), kvarpenco.
groats (coarse meal), griajo; (hulled grain), grio; (wheaten), tritikajo.
grocer, spicisto.

groceries, dealing in, spico'vendado-komerco.
grocery store, spicovendejo.
grog, grogo.
groin (anat.), ingveno; (arch.), ingvenarkajo.
groined, ingvenarkaja.
groining, ingvenarkaj'o-aro.
groom, grumo, ĉevalisto.
——, **to,** zorgi pri (ĉevalo).
groomsman, fianĉ'amiko, edzig'.
groove (channel), kanaleto; (crack), fendo; (cutting), entranĉo, elpreno, eltranĉo; (fluting), foldo; (wrinkle), sulkajo.
——, **scene-,** kulisingo.
——, **to,** eltranĉi, fari entranĉojn en, foldi, kaneli.
grooving, kanel'a-ado.
grope after, to, proveti palpe, palpe serĉi.
——, **to,** palp'i-eti.
groping, in, palp'e-ete.
groschen, groŝo.
gross-ly (manner), maldelikat'a-e.
gross (stout), dika; (with tare), kuntara.
——, **in,** pogrande.
—— **weight,** kruda pezo, brutta pezo.
—— **weight as nett,** pezomalneta por neta.
grot, groto.
grotesque, a (figure, etc.), groteskajo.
grotesque-ly, grotesk'a-e, ridindeg'a-e.
grotto, groto.
ground, grundo, tero; (adj.), surtera; (bottom), fundo; (cause), kaŭzo; (geology: formation), terajo; (motive), motivo; (of a design), kampo.
—— **floor,** teretaĝo; (pit of theatre), partero.
——, **low,** malaltajo.
——, **on to the,** sur la teron.
——, **owner of a parcel of,** parcelisto.
——, **piece of,** parcelo, tero, kampo.
——, **to the,** la teron, teren.
ground-plan, teretaĝa plano.
groundless-ly, senkaŭz'a-e, senfund'a-e.
grounds (lees), densajo.
groundsel, grundselo.
groundsill (building), sojlo.
groundwork, fundajo.
group, grup'o-a.
——, **to,** grupigi.
grouped, to become, grupiĝi.
groups, to form into, grup'igi-iĝi.
grouse, tetro.
——, **black-,** tetrao.
grove, bosko, arbareto.
grovel, to, rampi, agi malnoble, esti malnobla, malaltigi sin.
groveller, malnoblulo.
grow dark, to, mal'heliĝi-lumiĝi.
—— **in** (nails), en'korpiĝi-kreski.
—— **out, to,** elkreski.
—— **round, to,** ĉirkaŭkreski.
——, **to,** (el)kreski; (as plants), vegeti.
——, **to make to,** kreskigi.
—— **young, to,** (pli)juniĝi.
growing, kreskanta.
——, **a,** kreskado.
growl, murmurego.
——, **to,** murmuregi.
growling (disposition), murmurema.
grown, kresk'ata-ita, produktita.
——, **full-,** plenkreska.
—— **together, things,** kunkreskajo.
——, **well-,** belkreska.
grown-up, altkreska.
growth, kresk'o-ado.
——, **of small,** malgrand'peca-kreska.
—— **to, a,** alkresko.
"**grub**" (food), nutrajo.
grub, larvo.
——, **to,** fos'i-adi.
grudge, malam'o-ikeco-ado, malbonvolo.
——, **not to,** neenvii.
——, **to,** envii.
grudging-ly, avar'a-e, enviem'a-e, kontraŭvol'a-e.
gruel, avena supeto, aveneca supo.
gruff-ly, malafabl'a-e, malĝentil'a-e.
gruffness, mal'ĝentileco-afableco.
grumble, plend'murmuro-eto.
——, **to,** grumbli, plend'murmur'i-eti.
grumbling, murmur'ema, grumbl'; (disposition), plendmurmuremo.
grunt, a, grunto, porkbleko.
——, **to,** grunti, porkbleki, bleki kiel porko.
guaiacol (chem.), gajakolo.
guano, guan'o-a.

guarantee, garanti'o-aĵo.
——, **to**, garantii.
——, **without**, sengarantie, sen garantio.
guaranteed, garantiita.
——, **that cannot be**, negarantiebla.
guarantor, garantianto.
guaranty, garantiado.
guard (detachment), gardistaro; (occasional), gardanto; (professional), gardisto.
——, **a** (milit.), gvardio.
——, **advance-**, avangardo.
—— **against, to**, kontraŭ'gardizorgi.
—— **beforehand, to**, antaŭgardi.
——, **field-**, kampgardisto.
——, **rear-**, ariergardo.
——, **to**, gardi.
——, **to be on one's** (against), malfidi.
——, **to change**, sanĝi la gardostarantojn.
guard-house, gardejo.
guard-room, gardejo, punĉambro.
guardian (of a minor), zorganto, kuratoro, gard'anto-isto; patrono, konserv'anto-isto; protektant'o-a.
——, **co-**, kun'zorganto-kuratoro.
guardianship, zorganteco; (of a minor), kuratoreco.
——, **to hold in**, teni sub zorganteco.
gudgeon, gobio.
gueldèr rose, viburno.
guerilla, gerilo, eksterarmea militisto; (adj.), gerila, eksterarmea.
guess, konjekto; (a divining), diveno.
——, **at a**, je l'diveno, divene.
——, **causing to** (by giving an indication), divenigo.
——, **to**, konjekti; (attempt), divenprovi; (discover), diveni.
guessed, to leave to be, lasi diveni.
guessing, expert at, divenema.
——, **given to**, konjektema.
guest, gasto.
——, **a stay as a**, gastado.
——, **present to a**, gastodonaco.
——, **to be a**, gasti.
——, **to go out as a**, gaste eliri.
——, **to take a**, gastigi (iun).
guest-chamber, gastoĉambro.
guest-loving, gastama.
guffaw, ridego.
——, **to**, ridegi.
guide, gvid'anto-isto; (mech.), glitrelo; (standard), normo.
——, **to**, gvidi, konduki, direkti.
guide-post, vojmontrilo.
guidon (milit.), signeto.
guild, gildo, korporacio.
——, **member of a**, gild'ano, korporaci'.
Guildhall, magistrata domo; gild'ejo-sidejo.
guile, artifik'o-eco, ruz'aĵo-eco.
——, **without**, mal'artifika, sen'.
guileless-ly, senartifik'a-e, senruz'a-em'a-e.
guillotine, gilotin'o-a.
——, **to**, gilotini.
guilt, kulp'o-eco.
guilt'y-ily, kulp'a-e.
guilty, pekoplena.
—— **person**, kulpul'o-ino.
——, **to plead**, konfesi la kulpon.
guinea, gine'o-a.
guinea-fowl, numido.
guinea-pig (zool.), kobajo.
guipure lace, punto.
guise, ŝajno, vesto, modo, preteksto.
guitar, gitaro.
guitar-player, gitaristo.
gulden, guldeno.
gulf, golfo; (cleft), fendego; (pit), profund'ejo-aĵo.
gull (bird), mevo.
——, **to**, trompi.
gullet, ezofago, gorĝo, (en)glutejo, faŭko.
gum, gum'o-a; (resin), rezino; (teeth), dentokarno, gingivo.
——, **dammar**, damor'gluo-gumo.
—— **to**, al'glui-gumi, gumi.
gum-arabic, gumoaraba.
gum-lac, lakogumo.
gum-tragacanth, traganta gumo.
gummed, gumita, algluita.
gumminess, gum'eco, glu'.
gummy, gum'a-eca.
gums, abscess in the, furunko absceso (gingiva).
gun, pafilo.
gun-carriage, afusto, subpafilego.
gun-cock, ĉano.
gun-cotton, fulmokotono.
gunner (artilleryman), artileriano, kanonisto.

gunnery, kanon'arto, paf'.
gunpowder, pulvo, pulvopolvo.
gunshot (report), fajropafo; (wound), pafovundo.
gunsmith, pafil'faristo-isto.
gunwale, ŝip'rando, boat'.
gurgle, s, gargarsono.
——, **to,** kluki, gargarsoni.
gush, to (el)ŝpruci, elfluegi, torente flui, disflui.
gushing out, a, ŝpruco.
gust, ekvent'o-ego.
gustatory, gustumada.
gustiness, ekventeco.
gusty, ekvent'a-ema.
gut, intestotubo.
gutta percha, gutaperk'o-a.
gutter, defluilo.
——, **eaves-,** tegmenta defluilo.
——, **rain-,** pluva defluilo.
guttler, manĝegulo.
gymkhana, ĝimkano, sportkunveno.
gymnasium, gimnastikejo.
gymnast, gimnastik'anto-isto.
gymnastic, gimnastika.
gymnastics, gimnastiko.
——, **to practise,** gimnastiki.
gynecœum, gineceo.
gypsous, gipsosimila.
gypsum, gipso.
gypsum-burner, gips'isto-ofaristo.
gypsum-kiln (*or* **mill**), gipso'fabrikejo-farejo.
gypsum, rock-, gipsa ŝtonego.
gyrate, to, giri, turniĝi.
gyration, gir'o-ado, turniĝ'o-ado.
gyratory, gira, turniĝa.

H

Ha! ha!
haberdasher, fadenbutik'isto, pasament'.
haberdashery, faden'aĵo-komercaĵo.
habergeon, kordefend'ilo-avesto.
habit, kutim'o-lerto; (dress), vesto.
—— **of, to be in the,** kutimi, havi kutimon je.
——, **to cause one to break off a,** dekutimigi.
——, **to give up a,** dekutimi.
habitable, loĝebla.
habitation, loĝejo, loĝa domo; (house), domo.
habitation, fit for, loĝebla.
habitations, cluster of, domaro.
habits, kutimoj, moroj.
habitual-ly, kutim'a-e.
habituate, to, kutimigi.
habitue, ĉiamulo.
hack (for hire), dungĉevalo; (horse), malbona ĉevalo, ĉevalaĉo.
—— **off, to,** dehaki.
—— **round, to,** ĉirkaŭhaki.
—— **through, to,** trahaki.
——, **to,** haki.
hackle, kresto, kolplumo.
hackney-carriage, fiakro.
hackneyed, el'uzita, tro'.
had (possessed), hav'ata-ita.
—— **I been,** se mi estus . . . -ita (*or* -inta).
—— **it not been for . . .,** sen . . ., se ne estus . . .
—— **to be** (compulsion), devis esti.
haddock, eglefino.
Hades, infero, Hadeso.
hadji, hadjio.
hæmoglobin (anat.), (hæmatoglobin), hemoglobino.
hæmorrhage, hemoragio.
—— **of the lungs,** pulmosangado.
hæmorrhoid-al, hemorojd'o-a.
haft, tenilo.
hag, sorĉistino, malbelulino.
haggard (emaciated), malgrasiĝinta; (wild), sovaĝa.
haggle, to, proponi malgrandan prezon; (cheapen), marĉandi.
haik (Arab mantle), Araba mantelo.
hail! saluton!
—— **! all,** altsaluton!
hail, hajl'o-a.
——, **to,** hajli; (greet), saluti; (mar.), alvokegi.
hails, it, hajlas.
hailstone, hajlero.
hair, har'o-a.
——, **a small,** hareto.
——, **arrangement of the,** hararango.
——, **curling the,** frizado, hararango.
——, **dishevelled,** pendhararo.
——, **head of,** hararo.
——, **loss of** (med.), harfalo.
——, **style of arranging the,** hararango.
——, **the,** la haroj, hararo.

hair, to cut the, of a criminal, puntondi.
——, **to dress the,** hararanĝi.
——, **to lose the,** senhariĝi.
——, **to part the,** dislimi la harojn.
——, **to pull out the,** senharigi (perforte).
——, **to raise the,** harstarigi.
——, **to straighten frizzy,** malfrizi la harojn.
——, **to undo the,** malaranĝi la harojn.
——, **tress of,** harligo.
—— **wavy, to make the,** frizi la harojn.
——, **without,** senhara.
hair-bulb, harbulbo.
hair-clothing, hara vesto.
hair-comb (ornamental), harornamaĵo.
hair-dressing, frizo, hararanĝo.
hair-follicle, harsaketo.
hair-ornament, harornamaĵo.
hair-pin, piuglo por haroj, harpinglo.
hair-plait, harligo.
hair-shirt, harĉemizo.
hair-splitter, subtilemulo.
hair-tube, hartub'o-eto.
hairbreadth, harlarĝec'o-a, apenaŭa.
haired, spik'a-hava.
——, **black-,** nigrohara.
——, **long-,** longohara.
hairdresser, kombisto, frizisto, hararanĝisto, barbiro.
hairdresser's shop, hararanĝ'ejo, peruk', barbir'.
hairy, haraja, vila, harplena.
——, **to become,** fariĝi harplena.
halberd, halebardo.
halberdier, halebardisto.
halcyon, alciono.
hale, sana.
half, duona.
——, **a,** duono.
——, **by,** duone.
half- (prefix), duon-.
half-back (football), peristo.
half-binding, duonleda bindaĵo.
half-boot, duonboto, alta ŝuo.
half-breed, mestizo.
half-brother, duonfrato.
half-close, to (eyes), fermeti.
half-grown, duonkreska.
half-mast, ĝisduonmaste.
half-naked, duonenuda.
half-ounce, lodo.
half-pay, duonsalajr'o-a.
half-profile, duonprofil'o-e.
half-sister, duonfratino.
half-tone (mus.), duontono.
half-understand, kompreneti.
half-way, duonvoje.
half-year, duonjaro, sesmonato.
halfpenny, duonpenc'o-a.
halibut, hipogloso.
hall, salonego, kunvenejo.
——, **entrance-,** vestiblo, enirosaloneto.
——, **market-,** halo.
hall-mark, or'kontrolmarko-arĝent'.
hall-porter, pordisto.
hallelujah! halelujao, haleluja! Dionlaŭd'o-a.
hallo! he!
hallow, to, sanktigi.
hallucination, halucinacio, sentoeraro.
halo, glorkrono; (phot.), haloo.
halogen, halogeno.
halogenous, halogena.
haloid, halojd'o-a.
halt! haltu!
halt (lame), lama.
——, **a,** halt'o-ado.
——, **to** (lame), lamiri; (stop), halti.
halter, ĉevalgvidilo, kolbrido; (execution), pendĝnuro.
halting, without, senhalte.
halting-place, haltejo.
halve, to, duonigi.
halves, by, poduone.
halyard, tir'ŝnuro, vel'.
ham, ŝink'o-a.
——, **a,** porkokruro.
hamlet, vilaĝeto, domareto.
hammer, martelo.
——, **to,** marteli, bati, skulpti.
hammering, martelado.
hammock, hamako, pend'lito, balanc'.
hamper, korb'o-ego.
——, **to,** malhelpi, embarasi.
hamster (pouched rat), hamstro.
hamstring, the, subgenuo.
——, **to,** tranĉi la subgenuon.
hand, man'o-a; (of a clock), montrilo; (of watch), montrileto.
——, **a person with one,** unumanulo.

hand, a small, maneto.
——, **a thing at,** prokaimajo, apudajo.
—— **against, to lift up one's,** levi la manon kontraŭ, ekbatali kontraŭ.
——, **at,** prokaime.
——, **at first,** apud-e.
——, **fleshy part of the,** mankarno.
—— **in hand,** mano ĉe mano.
——, **left,** maldekstra mano.
——, **mill-,** fabriklaboristo.
——, **minute-,** minutmontrilo.
——, **moved by,** manmovo.
——, **note of,** mon'bileto, ŝuld'.
——, **on,** enproviz'a-e.
——, **on the other,** kontraŭe, male, aliflanke, de la dua flanko, je la alia flanko.
—— **over,** trans'doni, man'.
——, **right,** dekstramano.
——, **the five fingers of the,** kvinfingro.
——, **to burn the,** bruldifekti al si la manon.
——, **to do by,** man'labori-fari.
——, **to lend a,** interhelpi.
——, **to put in,** ekfar'i-igi, enmanmeti, enmanigi.
—— **to, to,** enmanigi.
——, **wave of the,** man'saluto-agito.
——, **without,** manmanka.
——, **work done by,** manfarajo.
hand-barrow, puŝveturilo, portilo.
hand-bell, sonorileto, mansonorilo.
hand-brush, manbalaileto.
hand-camera, mankamero, detektiv-aparato.
hand-cart, puŝveturilo.
hand-gear, man'tenilo-radaro.
hand-glass (bell), klošo; (mirror), speguleto.
hand-kiss, mankiso.
hand-labour, manlaboro.
hand-loom, manteksilo.
hand-screen, ŝirmileto.
hand-shake, manpremo.
hand-shaped, man'simila-forma.
hand-spike, levilo.
hand - to - hand, mankontraŭman'a-e.
—— —— **fight,** unuopa batalo, mana batalo.
hand - to - mouth, laŭurĝ'a - e, hodiaŭ'a-e, nunbezon'a-e.
hand-warmer, manvarmigilo.
hand-work, manlabor'o-ajo.
hand-worked, manfarita.
hand-working, manfarado.
handbill, bileto.
handcuff-s, mankateno-j, ĉirkaupremil'o-eto.
handcuff, ĉirkaŭligi.
——, **to,** man'ligi-kateni.
handed, left-, maldekstruma, maldekstra.
——, **right-** (math.), dekstruma.
——, **two-,** dumana.
handful, plenmano.
handicap, a, handikap'o-ajo, egalig'o-iĝo.
——, **to,** handikapi, pli'favori-malfavori, egaligi, fari egalaj, plimalantaŭigi, pliantaŭigi, plipezigi, malhelpi, helpi.
handicapper, handikap'anto-isto, egalig'anto-isto.
handicraft, metio, manlaboro.
handicraftsman, meti'isto, manlabor'.
handiness, oportuneco, ĉeman'eco, manlert'.
handiwork, manfar'ajo-itajo, man'laborajo, ol'.
handkerchief, naztuko, tuketo.
handle, (man)tenilo, turnilo.
—— **and spoil, to,** fuŝpalpi.
——, **small,** mantenileto.
——, **to,** manpreni, manumi, tuŝi, palpi, premet adi, palpadi, okupi sin je; (manage), manregi, manuzi, manipuli; (work), manlabori.
handled, that can be, man'agebla-uzebla.
hands (folk), (labor)homoj, laboristoj.
—— **full, both,** plenaj manoj.
——, **to clasp the,** manplekti.
——, **with both,** ambaŭmane.
handsel, certiga pago, unua vendo, unua partpago.
handshaking, manpremo.
handsome-ly (generous), malavar'a-e.
handsome, bela, belvidiĝa; (shape), belforma.
—— **person,** belul'o-ino.
——, **to grow,** beliĝi.
handwriting, skribajo, skribkaraktero, manuskripto.
——, **current,** kursiva skribo.

handy, ĉemana, apud'a-mana, ĉe l'mano, atingebla, managebla, oportuna, ĝustag'a-ema, lerta.
hang from, to, dependi de; (trans.) dekroĉi.
—— **on, to,** alkroĉ'i-iĝi.
—— **out, to,** elpendi.
—— **over, to,** superpend'i-igi.
——, **to** (execute), mortpendigi; (int.), pendi; (trans.), pendigi; (with tapestry, paper, etc.), tapeti.
—— **to, to,** alpend'i-igi.
—— **together, to,** kunkroĉ'i-iĝi.
—— **up, to,** (al)kroĉi, alpendigi.
—— **upon, to,** alkroĉi.
—— **with cloth, to,** drapiri.
hanger (sword), kurba glavo, tranĉilego.
hanging, pendornam'o-aĵo; (curtain), ĉirkaŭpend'o-aĵo; (on the gallows), pendigo.
——, **deserving of,** pendiginda.
—— **of one's self, a,** mempendigo.
hanging-lamp, lucerno.
hangings, pendaĵoj; (paper- *or* tapestry-), tapeto.
——, **bed-,** tapeto.
hangman, ekzekut'isto, pendig'.
hank, fadenaro, volvaĵo.
hanker, to, deziregi, sopiri (por).
hap, okazo, ŝanco.
hapless-ly, malfeliĉ'a-e, malprosper'a-e.
haply, eble, per ŝanco.
happen, as it may, laŭokaze.
—— **that . . . if it should,** se okaze fariĝus ke . . .
——, **to,** (ek)okazi; (take place), fariĝi.
happened? what has, kio okazis?
happiness (in itself), feliĉo; (state of), feliĉeco.
happ'y-ily, feliĉ'a-e.
happy memory, of, bonmemora.
—— **person,** feliĉulo.
——, **to make one supremely,** feliĉegigi.
harangue, deklama parolado.
harass, to, ĉagrenadi, trolaĉigi, ĝenadi, lacegigi, atakadi.
harassed, atakadita, laceg'a ita, ĝenadita.
——, **to be,** turmentiĝi.
harbinger, antaŭ'iranto-kuranto.
harbour, haveno, enâipigejo; (shelter), rifuĝ'ejo, ŝirm'.
harbour, inner, post-haveno.
——, **outer basin of,** antaŭhaveno.
——, **to,** enloĝigi; (entertain), gastigi.
hard-ly, malmol'a-e; (difficult), malfacil'a-e; (moral), penig'a-e; (severe), sever'a-e. (*See also* **hardly.**)
hard (as a corn), kal'a-eca; (feeling), sensenta; (firm), firma.
—— **of hearing,** surdeta, nebonaŭda.
—— **labour,** punlaboro.
hard-hearted-ly, sensent'a-e.
harden, to, malmol'igi-iĝi, plifortigi, kruel'igi, obstin'; (int.), hardiĝi, enfortikiĝi; (inure), hardi; (metals), harti; (morally), malcedemigi; (set), hardiĝi.
hardened, hardita; (moral), enfortik'igita, sensent', obstin'.
—— **by mountain life,** monthardita.
——, **to become,** sensent'iĝi, malmol'.
—— **to, to become,** hardiĝi (pri).
hardening (setting), hardiĝo.
hardihood, maltimeco, kuraĝ'ego, riskemo; (effrontery), senhonteco.
hardly, malfacile, severe, sensente, malmole, maldolĉe, preme, maljuste, fort'e-ege; (scarcely), apenaŭ, preskaŭ ne.
hardness, malmol'eco, malfacil', sever', sensent', prem', maldolĉ', maljust'.
hardship, malfeliĉego, maloportuneco; (injustice), maljustaĵo.
hardware, metalkomercaĵo; (metal), ferajo, kuirilaĵoj.
hardworking, labor'ema, penad'.
hardy, fortika, hardita.
hare, lepor'o-a.
——, **jugged,** leporaĵo en saŭco.
hare-brained, sen'cerba-senca.
—— —— **person,** ventkapulo.
hare-like, leporsimila.
hare-lip, leporlipo.
harem, haremo, virinejo.
haricot-bean, fazeol'o-a.
hark! aŭskultu!
harkening, aŭskultanta.
harlequin, arlekeno.
harlequinade, burleskaĵo.
harm, to, malutili.
harmful-ly, malutil'a-e.
harmful, to be, malutili.

harmless-ly, nedifektig'a-e.
harmonic (math.), harmona.
harmonica, harmoniko.
harmonious-ly, harmoni'a-e, bonson'a-e, belson'a-e.
harmonium, harmoniumo.
harmonize, to, harmoniigi; (mus.), akordi.
harmony, harmonio, asonanco; (agreement), inter'kompreno - konsento; (concord), kunkonsento; (euphony), bel'soneco, bon'; (mus.), akordo; (symmetry), gracieco.
harness, jungaĵo, jungilaro.
——, **ornamental**, ĉevalornam'o-aĵo.
——, **to**, jungi.
——, **to put on**, surmeti la jungaĵon.
—— **to, to**, aljungi.
harness-maker, sel'faristo-isto.
harp, harpo.
harpist, harpist'o-ino.
harpoon, harpuno.
——, **to**, harpuni.
harpooner, harpunisto.
Harpy, Harpio.
harrier, leporhundo.
harrow, a, erpilo.
——, **to** (agric.), erpi; (metaph.), doloregi, korŝiri, turmenti.
harrowing (metaph.), korŝiranta.
harsh-ly, malafabl'a-e, sever'a-e, maldolĉ'a-e; (sound), akrason'a-e, raŭk'a-e.
harsh (taste), maldolĉa, akra, pika.
harshness, maldolĉ'eco, akr', sever', malafabl'.
hart, cervo.
harvest, rikolt'o-a.
——, **a plentiful**, bonrikolto.
——, **hay-**, rikolto de fojno.
——, **to**, rikolti, enpreni la fruktojn.
harvester, rikoltant'o-ino.
has (possession), havas, posedas.
—— **to be** (compulsion), devas esti.
hash, spicaĵo, spica viando, viandmiksaĵo; (metaph.), fuŝmiksaĵo, miksaĵo; (repetition), ripetmiksaĵo.
——, **to**, haketmiksi.
hasp, a, agrafo.
——, **to**, agrafi.
hassock, genukusono.
haste, rapideco; (urgency), urĝ'ecaĵo.
——, **in**, rapide, urĝe.
——, **in all**, tre rapide, tre urĝe.
haste, inconsiderate, trorapideco.
——, **to make**, rapidi.
hasten (int.), rapidi; (trans.), rapidigi, akceli.
—— **away, to**, forrapidi.
—— **on, to**, rapid'igi, aktiv'.
hastily, rapide, nepripense.
hast'y-ily, trorapid'a-e.
hasty (disposition), rapidema, kolerema.
hat (man's or woman's), ĉapelo.
——, **cocked-**, tripinta ĉapelo.
—— **on the head, to cram the**, plene surmeti.
—— **on, to put one's** (to cover), kovriĝi je la ĉapelo.
——, **three-cornered**, trikorna ĉapelo.
——, **to pull, over the eyes**, depremi la ĉapelon sur la vizaĝon.
hat-shop, ĉapel'ejo-butiko.
hatch out, to, elrampi; (int.), rompi la ŝelon, elŝeliri, naskiĝi; (trans.), elsidi.
——, **to**, elŝel'igi-iĝi; (art), krucostreki; (plot), konspiri; (sit), sursidi; (trans.), kovi.
hatched, to become, elŝeliri, eloviĝi.
hatches, under, subfordeke, ferdekfermite.
hatchet, hakil'o-eto.
hatching, kovado, elov'igo-iĝo; (art), krucostrek'aĵo-ado; (plot), konspirado.
—— **out**, elkovado.
hatchment, insigno.
hatchway, (ferdek)truego, kavbuŝo.
hate, malamo.
—— **intensely, to**, malamegi.
——, **of**, malama.
——, **to**, malami.
——, **to begin to**, ekmalami.
hated, malamata.
hateful-ly, malamind'a-e, malamplen'a-e.
hating, malam'a-anta.
hatred, malam'o-eco.
——, **malignant**, malamego.
hatter, ĉapelisto.
haughtiness, arogantoco, malhumileco; (pride), fiereco.
haught'y-ily, arogant'a-e, malhumil'a-e; (proud), fier'a-e.
haughty person, fier'ulo, arogant'.

haul about, to, distiri.
——, **to,** tren'i-adi.
haulage (cost), trenkosto.
hauling, fortotir'o-ado; (mar.), trenado.
haunch, kokso, malantaŭajo.
haunt, a, vizitadejo, estejo.
——, **to,** fantomvizitadi; (possess), obsedi.
haunted, fantomvizitata.
——, **the place is,** fantomoj iras.
hautboy, hobojo.
havana, havana, havancigaro.
have (past p.), estas . . . inta.
"—— **it out,**" **to,** likvidi malpacon.
——, **to,** havi, posedi.
—— **to, to,** devi, esti devigata
—— **to . . ., will,** devos.
——**? what will you,** kion vi volas?
——. . .**? will you,** ĉu vi volas. . .?
haven, haveno.
haversack, tornistro.
having been, estinta.
——, **worth,** havinda.
havoc, difekteg'o-ajo, dezertig'o-ado.
——, **to make,** difektegi, dezertigi.
hawk (falcon), falko; (goshawk), akcipitro; (sparrow-), nizo.
——, **to,** kolporti; (throat), kraĉotusi.
hawker, kolportist'o-ino.
hawking (chase), falkoĉaso, ĉaso per falko; (vending), kolport'ado, stratvend'.
hawser, trenkablo.
hawthorn, kratag'o-a.
hay, fojn'o-a.
——, **chopped,** tranĉita fojno.
hay-harvest, rikolto de fojno.
hay-loft, fojnejo.
hay-mow, fojnamaso.
hay-rack, fojnujo, raŭfo.
hay-sack, fojnosako.
hazard, hazardo, danĝero, risko; (luck), ŝanco.
——, **game of,** hazarda ludo.
——, **to,** riski.
hazardous-ly, hazard'a-e, danĝer'a-e.
haze, nebuleto.
hazel nut, avelo.
hazel-hen, tetrao.
haziness, nebuleteco.
—— **at sea,** marnebul'o-eto.
haz'y-ily, nebulet'a-ec'a-e; (vague), nedifinit'a-e.
hazy, to be, nebuleti.
he- (of animals), -viro (suffix).
he, li.
—— **himself,** li mem.
——, **such as,** liaspeca.
—— **who . . .,** tiu, kiu . . .
—— **whom . . .,** tiu, kiun . . .
he-goat, kapro-viro.
head, kap'o-a; (chief), estr'o-a, ĉef'o-a; (cranium); kranio; (of a family), fondapatro; (top), supr'o-ajo, kapajo.
——, **a turning of the,** kapturno.
——, **at the,** supre.
——, **bald-,** senhara kapo.
——, **bare-,** nudkap'o-a-e.
——, **contusion on the,** kapkontuzo.
——, **empty-,** vent'kapulo, malplen'.
——, **heaviness of the,** dormemo.
—— **of a department,** departementestro.
—— **over heels, to turn,** kaprenversiĝi, rulfali, transkapiĝi.
——, **support the** (by resting the elbows upon table, etc.), kubutapogi.
——, **to** (a column, *or* chapter), enrubrikigi.
——, **to bring to a,** akceli la maturiĝon.
——, **to come to a,** sukcesi, prospori, maturiĝi; (med.), pusiĝi.
——, **to dress the,** vesti la kapon.
——, **to take into one's,** ekvoli.
——, **without a,** senkapa; (chief), senestra.
head-cover, kaptuko.
head-downwards, kun la kapo malsupro, kaprenversite.
head-dress, kap'ornamo-vesto, vesta kapornamo.
head-first, kun la kapo antaŭe.
head-like object, kapsimilajo.
head-line, titolo; (of copy-book), antaŭskribo; (printing), rubriko.
head-pan, kranio.
head-piece, kasko.
head-splitting, kaprompa.
head-to-feet, kapopiede.
headache, kapdoloro; (one-sided), hemikranio.

headache due to drink, postdrinka kapdoloro.
——, **sick-**, kapdolorego (naŭza).
headed (entitled), titolita; (led), konduk'ita, direkt'.
——, **wrong-**, troobstin'a-ema.
heading, titolo, rubriko.
headland, promontoro.
headless, senkapa.
headlong, kun la kapo antaŭe; (sudden), subit'a-e; (thoughtless), senpripens'a-e.
——, **to throw oneself**, enabiamiĝi.
heads-and-tails, kapopiede.
headship, ĉefeco.
headstrong, obstin'a-ega.
headway, (antaŭen)irado, progresado, sukceso.
heady, obstina, riskema, memopinia; (liquor), ebriiga.
heal over, to, cikatriĝi.
——, **to**, resan'igi-iĝi; (treat), kuraci.
healed, to become, resaniĝi.
healer, a, resanig'anto-isto.
healing, resanig'o-ado.
—— **by spells**, superstiĉa kurac'o-ado.
healing-art, resanigarto.
health (general), san'o-eco; (good), bonsano; (state of), farto, stato; (weal), bon'sano-stato.
——, **a** (toast), tosto, prosano.
——, **a person of uncertain**, sanetemulo.
——, **good**, bon'sano-farto-stato.
—— **! good**, fartu bone! bonstatu!
—— **! here's to your**, pro sano! al via sano!
——, **in**, bonfart'a-e, bonsan'a-e, bonstat'a-e.
——, **in fair**, saneta.
——, **injurious to**, malsaniga.
——, **prejudicial to**, malsanigema.
——, **state of**, farto, san'o-eco, sanstato.
——, **to be in weak**, esti malsanema.
——, **to bring into good**, alkonduki en bonan staton (*or* sanon).
—— **of, to drink the**, trinki pro ies sano.
——, **with a tendency to ill-**, malsanema.
health-giving, saniga.
health-resort (*or* **locality**), sanejo.
healthiness, (bon)saneco.
health'y-ily, (bon)san'a-e, bonfart'a-e, bonstat'a-e.
healthy (strong), fortika; (tendency to produce—as ventilation), sanigema.
——, **inclined to be**, sanema.
——, **one inclined to be**, sanemulo.
—— **part**, sanajo.
——, **tendency to be**, sanemo.
heap, amaso.
—— **of ashes**, brulinta loko, cindrejo.
—— **of miscellaneous goods**, fikomercajo.
—— **up, to**, amasigi; (collect), kolekti.
heaped up, amasigita; (measure), plenega.
heaped-up mass, amasiĝo.
heaps, to rake into, multe rasti.
hear favourably, to, plenumi la peton.
——, **to**, aŭdi.
——, **to fail to**, ne aŭdi.
hearing, (la) aŭdado.
——, **hard of**, surdeta, malbonaŭda.
hearken, to, aŭskulti.
hearkening, aŭskult'anta-ado.
hearsay, reaŭditajo, raporto el dua buŝo, komuna raporto; (part.), malrekte'aŭdita, re'; (rumour), famo.
hearsay-evidence, atesto el dua buŝo.
hearse, ĉerkveturilo.
heart, kor'o-a; (cards), kero; (midst), mezo; (tree), trunko (interna).
——, **by**, parkere.
——, **goodness of**, bonkoreco.
——, **in good** (agric.), herboriĉa.
——, **to lose**, perdi la kuraĝon.
——, **to take out the**, senkorigi.
——, **to take to**, preni en la koron.
heart-ache, korpremo.
heartburn, pirozo.
hearted-ly, hard-, sensent'a-e.
hearted, bad-, malbonkora.
——, **good-**, bonkora.
——, **open-**, malkovranima.
hearth, fajrejo, hejmo.
hearten, to, rekuraĝigi, refortigi.
heartiness, (bon)koreco, sincereco; (med.), bonapetiteco.
heartless-ly, senkor'a-e.

heart-rending - ly, korŝirant'a - e, korŝir'a-e.
heartsease, violo (trikolora); trikoloreto.
heart'y-lly, (bon)kor'a-e.
——, **most,** koreg'a-e.
heat, varm'o-eco; (met.), flameco.
—— **again, to,** re'varmigi-hejti.
——, **great,** varmegeco.
——, **in a great** (metaph.), kolerege, pasie.
——, **to** (as a boiler), hejti; (cause to be warm), varmigi.
——, **to give off,** eligi varmon.
—— **to redness, to,** brulruĝigi, brulvarmigi.
heated, to become, varmiĝi.
heath, erikejo, stepo; (bot.), eriko.
heathcock, urogalo.
heathen, idol'ano-isto, idolanaro.
heathen-ish (adj.), idolan'a-eca.
heather, eriko.
heating, hejtado.
—— **to redness,** brulruĝigo.
heating-apparatus, hejtaparato.
heave, a, ek'levo-jeto.
——, **to,** ondmoviĝi, sin levi; (pull), ektiri; (swell), ŝveli; (throw), (ek)jeti.
heaven, (la) ĉielo.
——, **gift of,** ĉieldonaco.
heavenwards, ĉielen.
heaviness, (multe)pezeco.
heaving, ondsimilanta.
heav'y - lly, pez'a-e; (burdened), ŝarĝ'a-e.
heavy (clumsy), pezaja; (important), grava; (thick), dika.
——, **to be,** pezi.
——, **to grow,** peziĝi.
hebdomadal, ĉiusemajna.
hebdomadary, ĉiusemajnulo.
Hebraism, hebraismo.
Hebrew, Hebre'o-a.
hecatomb, hekatombo.
hectare, hektaro.
hectic, hektika, konsumiga.
hectogram, hektogramo.
hectograph, hektografo.
hectolitre, hektolitro.
hectometre, hektometro.
hector-er, malkviet'ulo, fanfaron', kuraĝafekt'.
hector, to, insulti, minaci, riproĉegi, fanfaroni.
hectoring, kuraĝafekta, fanfarona.
hedge, plekt'barilo, brancо'.
——, **to,** fari baron; (gambling), veti ambaŭflanke.
hedge-pole (*or* **stake**), paliso.
hedgehog, erinaco.
hedgesparrow, akcentoro.
heed, atent'o-ado.
——, **to,** atent'i-adi.
——, **to take,** esti singarda.
heedful-ly, zorg'a-em'a-e.
heedfulness, zorg'emo, singard'.
heedless-ly, senzorg'a-e, neatent'a-e, malpenem'a-e.
heedlessness, neantaŭ'zorgo, senz'; (apathy), apatio.
heel, kalkano; (list), kliniĝmovo.
——, **boot-** (*or* **shoe-**), kalkanumo.
——, **to** (a boot), kalkanumi; (naut.), flankenkliniĝi.
heeling, a (naut.), flankenkliniĝo.
heifer, bovidino.
height, alt'o-eco-ajo; (top), supro.
—— **of enjoyment,** ĝuego.
——, **perpendicular of a chord** (math.), sago.
heighten, to, plialtigi, kreskigi.
heinous-ly, abomen'a-e, malamegind'a-e, malboneg'a-e.
heinousness, malamegind'eco, abomen'.
heir, bienara posed'anto-onto; (by will), testamenta hered'anto-onto.
——, **co-,** kunheredanto.
heir-at-law, laŭleĝa hered'ontoanto.
heiress, heredantino.
heir-ship, hered'anteco-onteco.
—— ——, **joint-,** kunhered'o-eco.
held, ten'ata-ita.
——, **to be** (as, a meeting), okazi.
helical axes, instantaneous, instanta helicakso.
—— **movement** (math.), helicmovo, movo heliceca.
heliometer, heliometro.
helioscope, helioskopo.
heliotrope, heliotrop'o-a.
helium, heliumo.
helix (math.), helico.
hell, infero, geheno.
hellebore, heleboro.
Hellenism, helenismo.
hellish-ly, infer'a-eo'a-e.

helm, timono, direktilo; (wheel), direktilrado.
helmet, kasko.
helmsman, timonisto, direktilisto.
help! helpu! helpon!
help, help'o-ad'o-aĵo.
—— **but, cannot**, ne povas, ne esti devigata.
——, **female**, help'antino, serv'.
—— **of, with the**, per.
——, **to**, helpi.
——, **to cry for**, krii helpon.
——, **to hasten to**, ekhelpi.
—— **to, to**, alhelpi; (at table), havigi.
——, **willing to**, helpema.
helper, helpanto; (subordinate), alservisto.
helpful, helpema.
—— **person**, helpemulo.
helping, help'a-anta.
helpmate, kun'ulino-helpant'o-ino.
helter-skelter, intermiksite, konfuzrapide.
helve, hakiltenilo.
hem, bordero, randstrio.
—— **round, to**, ĉirkaŭkudri.
——, **to**, borderi.
hemicrania, hemikranio.
hemiplegia (med.), hemiplegio.
hemisphere, duon'globo-sfero.
hemispherical, duonsfera.
hemispheroidal, duonsfereca, preskaŭ duonsfera.
hemistich, duonverso.
hemlock, cikut'o-a.
hemmed, ĉirkaŭkudrita.
hemorrhage, sangado.
hemorrhoid, hemorojdo.
hemp, kanab'o-a.
hemp-field, kanabejo.
hempen shoe, kanaba piedvesto.
hempen-cloth, kanabtolo.
hempseed, kanabsemo.
hemstitch, to, bordeti.
hen, kokino.
——, **broody**, kovkokino.
——, **sitting-**, kokino sursidanta.
hen-house, kokejo.
henbane, hiskiamo.
hence, kaŭzo de tio, pro tio, tial, de tie; (time), de nun, poste.
—— **!** for (de tie ĉi)!
henceforth, de nun.
henceforward, de nun.
hendecasyllabic, dekunusilaba.
hepatic, hepata.
heptagon, sepangulo.
heptagonal, sepangula.
her (pronoun), ŝi, ŝin.
——, **hers**, ŝia, la ŝia; (reflexive), sia.
—— **sort of**, ŝiaspeca.
herald, heroldo.
heraldic, heraldika, blazona.
heraldry, heraldiko, blazonarto.
herb, herb'o-a, kreskaĵ'o-a.
herbaceous, herbeca.
herbage, herbaĵo, paŝto, paŝtoherbo.
herbal, herba; (herbarium), herb'aro-olibro.
—— **thing**, herbaĵo.
herbalist, herbo'vendisto-kuracisto, vendisto de sanigaj herboj.
herbarium, herbaro, herbario, herbokolekto.
herbiferous, herboprodukta.
herbivore, herbomanĝanto.
herbivorous, kreskaĵomanĝ'a-anta, herbomanĝanta.
herculean, herkulesa.
herd, brutaro, amaso da brutoj.
herdsman, paŝtisto.
here, tie-ĉi, ĉi-tie.
——, **from**, de tie ĉi.
—— **is** (*or* **are**), jen estas.
—— **it is!** (*or* **they are!**), jen estas!
—— **you are!** jen vi estas! jen vi havas!
—— **you have it!** jen vi havas!
hereafter, de nun, estonte.
hereat, je tio ĉi, pro tio ĉi.
hereby, per tio ĉi.
hereditary, hered'a-ita.
heredity, heredeco.
herein, en tio ĉi, pri tio ĉi; (enclosed), entenate.
heresy, herezo.
heretic, herez'ulo-isto.
heretical-ly, herez'a-e.
hereto, tien ĉi.
hereunto, ĝis tio ĉi, tien ĉi.
herewith, entenate, ĉi kune, almetite, per tio ĉi, tie ĉi aldonita (enfermita).
heritage, hered'o-aĵo.
hermaphrodite, hermafrodit'o-a, duseks'a-ulo.
hermetical-ly, hermetik'a-e.
hermetically, to seal, luti hermetike.

hermit, ermit'o-a, dezertulo.
hermitage, ermitejo.
hernia, hernio.
——, **one afflicted with,** herniulo.
——, **strangulated,** strangolajo, entordita hernio.
hero, heroo.
heroic-al-ly, hero'a-e.
heroic deed, heroajo.
—— **exploit,** heroa faro.
heroine, heroino.
heroism, heroeco.
——, **act of,** heroajo.
heron, ardeo.
——, **small white,** tufardeo, egretardeo.
herpes, likveno.
herring, haring'o-a.
herself (when referring to subject of sentence), sin.
——, **she,** ŝi mem.
hesitate, to, ŝanceliĝi, halteti.
hesitating-ly, ŝanceliĝ'a-em'a-e, nedecidem'a-e.
hesitation, ŝanceliĝo.
heterodox, ali'religia-kreda; heroz'a-eca.
heterogeneous-ly, heterogen'a-e.
heterogeneous, malegal'speĉaj, diversa'.
heterogeneousness, heterogeneco.
Hetman (chief of Cossacks), hetmano.
hew, to, hak'i-skulpti.
—— **down, to,** dehaki.
—— **out, to,** elhaki.
——, **to rough-,** ĉirkaŭfendi.
hewer (stonemason), ŝtonhakisto.
hewn stone, laborita ŝtono.
hexagon-al, sesangul'o-a.
hexahedron (math.), sesedro, heksaedro.
hexameter, heksametr'o-a.
hexapod, sespied'a-ulo.
hexapterous, sesflugila.
hexastich, sesversa.
hexasyllabic, sesosilaba.
hiatus, malplenajo, manko.
hibernate, to, vintredormi, travintri.
hibernation, vintrodormado, travintrado.
——, **state of,** vintrada stato, vintra dormadeco.
hiccough, singulto.
hiccough, to, singulti.
hickory, kari'o-a.
hidden, kaŝita, sekreta.
—— **manner, in a,** kaŝate.
hide (of land), hubo; (skin), haŭto; (skin with hair on), felo, pelto.
——, **a disposition to,** kaŝemo.
—— **and seek,** blindludo.
——, **Muscovy,** jufto.
—— **of land, possessor of a,** hubulo.
—— **oneself, to,** sin kaŝi.
——, **to,** kaŝi; (crouch), kaŭri, sin kaŝi.
—— **within, to,** enkaŝi.
hideous-ly, malbeleg'a-e, timig'a-e, terurig'a-e.
hiding-place, kaŝejo.
hie, to, rapidi.
hierarch, ĉefo (de hierarĥio), hierarĥiestro, sankta ĉefo.
hierarchical, hierarĥia.
hierarchy, hierar'hio-kio.
hieroglyph, hieroglifo.
hieroglyphic (adj.), hieroglifa.
hieroglyphic-s, hieroglif'o-aro.
higgle, to, marĉandi, proponi pli malgrandan prezon.
high-ly, alt'a-e.
high (loud), laŭta.
—— **degree, of,** alt'grada-ranga.
—— **priest,** ĉefa pastro, ĉefpastro.
——, **the Most,** Plejaltulo.
high-class, bonklasa, supereca.
high-flown, altesprima, ŝvelaja.
high-mettled, vivega.
high-soaring, altfluganta, altesprima.
high-spirited, eksciteme, vivega, maltima.
high-treason, regna perfido.
high-water, plen'maro-tajdo.
higher, pli alta.
—— **level, the being on a,** plialteco.
——, **to make,** plialtigi.
——, **to set,** plialtigi.
highest, plejsupra.
——, **The,** La Plejalta.
highland, montana regiono.
highlander, montano.
highlow, duonboto.
highly, tre.
highminded, noblanima.
Highness, Royal, Reĝa Moŝto.

highroad, vojo, (land)vojo.
highway, military, milita strato (*or* vojo).
highwayman, (voj)rabisto.
hill, monteto.
hill-dweller, mont'ano-etano.
hillock, altajeto.
hills, surrounded by, montĉirkaŭita.
hilly, mont'hava-ĉirkaŭita.
hilt, (man)tenilo.
him, lin.
—— **who . . .**, tiun, kiu . . .
—— **whom . . .**, tiun, kiun . . .
himself (when referring to subject of sentence), si, sin.
——, **he**, li mem.
hind, cervino.
—— **part**, posta flanko.
——, **young**, cervidino.
hind- (prefix), post-.
hind-quarter, dorsparto.
hinder, posta.
—— **part**, posta flanko.
—— **parts**, postaĵo.
——, **to**, malhelpi, malrapidigi.
hindermost, plej posta.
hindrance, malhelp'o-aĵo, kontrauaĵo.
hinge, ĉarniro, pordhoko.
hint, aludeto, aviz'o-eto, rimarketo, neplenesprim'o-aĵo, sugestio.
——, **to**, aviz'i-eti, sugestii, altuŝi, neplenesprimi.
hip, koks'o-a; (bot.), rozofrukto.
hip-bone, koksosto.
hip-joint, artiko de l'kokso.
hippodrome, hipodromo.
hippopotamus, hipopotamo.
hire (of things), lukosto; (pay), lua pago; (rent), luprezo; (wages), salajro, dungo'kosto-pago.
—— (*or* **renting**), **by**, lue.
——, **for**, luebla.
—— **out, to**, luigi.
——, **to** (property), lui; (servant), dungi.
——, **to let on**, luigi.
hired labourer, lulaboristo, dungato.
——, **that may be**, luebla.
hireling, dungato, salajrulo.
hirer, luanto.
his, lia; (reflexive), sia.
—— **kind, of**, liaspeca.
his part, on, liaflanke.
—— **side, on**, liaflanke.
hiss, siblo.
—— **off, to** (stage), elsibli.
——, **to**, sibli; (as in boiling), akresoni, bolbrui.
hissing, sibl'a-antà, malaplaŭd'oado.
historian, histori'isto - skribanto, kronikisto.
history, historio.
——, **natural**, naturscienco, natura historio.
hit, frapo, bato, trafo.
—— **against, to**, alfrapi, ektuŝegi.
——, **to**, frapi, bati; (the mark), trafi.
—— **upon, to**, ek'trafi-pensi.
hitch, alkroĉiĝo; (hindrance), malhelpaĵo; (rope), šnurbanto.
——, **to**, alkroĉ'igi-iĝi.
hither, tien či, či-tien.
—— **and thither, to bustle**, kuradi kaj rekuradi.
hitherto (place), ĝis tie či; (time), ĝis nun.
hive, abelujo.
ho! ho! he!
hoar, blank'a-eca, prujn'a-eca.
hoar-frost, prujno.
hoar-frosted, prujna.
—— ——, **to be**, prujniĝi.
hoard, amaso, kaŝprovizaĵo.
——, **in addition to**, al tio ĉi.
—— **one**, tiu ĉi, ĉi-tiu.
—— **one's**, ĉi-ties.
——, **up to**, ĝisnune.
thistle, kardo.
thistles, a place of, kardejo.
thither, tien.
thitherto, ĝis tie.
thitherward, al tie, tien.
thole (boat), remilpinglo.
thong, (led)rimen'o-eto.
thorax, torako, brusto'kesto-kavo.
thorium (chem.), tori'o-a.
thorn, dorn'o-a.
thorn-apple, daturo.
thorn-broom (gorse), ulekso.
thorn-bushes, dornarbetaĵo.
thorns (bushes), dorna arbetaĵo.
thorny, dorn'a-oplena.
thorough-ly, fund'a-e, fundament'a-e, plen'a-eg'a-e, tut'a-e, trair'a-ant'a-e.
thoroughbred, pursanga.
——, **a**, pursangulo.
thoroughfare, trair'ejo, travetur'.
thoroughness, plen'eco, tut', perfekt'.
thorp, vilaĝ'eto, domar'.
thou, ci; (you), vi.
——, **such as**, tiaj (personoj) **kiaj ci**, similaj al ci (*or* vi).
"——," **to**, diri ci, ci-diri.
though, kvankam.
——, **as**, kvazaŭ.
thought, la pensado.
——, **a**, penso.
——, **immersed in**, enpensiĝa.
——, **power of**, penspovo.
——, **to become immersed in**, enpensiĝi.
——, **without**, senpripens'a-e.
thoughtful-ly, meditem'a-e, pensem'a-e; (careful), zorgem'a-e.
thoughtful (immersed in thought), enpensiĝa.
thoughtfulness, medit'emo, pens'.
thoughtless-ly, senpripens'a-em'a-e, senatent'a-e.

thoughts, on first, unuaspense, ekpensinte.
——, **on second,** post plua konsiderado.
thousand, mil.
——, **a,** milo.
—— **and one nights,** Mil-kaj-unu-noktoj.
—— **million,** milmiliono.
thousandfold, milobla.
thousandth, mila.
——, **one-,** milono.
thraldom, sklaveco.
thrall, sklavo.
thrash, to, batego di; (as grain), draŝi; (strike), batadi.
thrashing-floor, draŝejo.
thread, fadeno.
—— **a needle, to,** enkudriligi fadenon.
—— **of a screw,** ŝraŭbo'relo-paŝo-volvajo.
—— **one's way,** trairi serpentume.
——, **spun-,** ŝpinajo, ŝpinita fadeno.
——, **to,** trameti (fadenon), entruigi (fadenon); (beads), fadenvicigi.
——, **to draw out into a,** fadenigi.
thread-like, faden'forma-simila.
threadbare, eluzita, fadenmontra.
threaded, (faden)vicigitaj.
—— **metal,** ŝraŭbajo.
threat, a, minaco.
threaten, to, minaci, juĝadmoni.
threatening-ly, minac'a-e.
threatening, a, minacado.
three, tri.
—— **kinds, of,** trispeca.
—— **together,** triope.
three-cornered hat, trikorna ĉapelo.
three-dimensional (math.), tridimensia.
three-horned, trikorna.
—— —— **animal,** trikorn'besto-ulo.
three-master, trimastulo.
three-ply, trifalda.
three-quarter-back (football), kuristo, trikvaronulo.
three-quarter-face, duonprofilo.
three-sided figure, trilatero.
three-times, tri'foje-fojojn.
threefold, triobl'a-e.
——, **made** (as thread), triopigita.
threepenny-piece, tripenco.
threescore, a, sesdeko.
threshold, sojlo.
thrice, trifoj'ojn-e; (multiple), trioble.
thrift, ŝpar'o-ado-emo.
thriftiness, ŝparemeco.
thrift'y-ily, ŝpar'a-em'a-e; (managing), mastrum'a-e.
thrifty (prosperous), prospera.
——, **to be,** ŝpari, bonmastrumi.
thrill, a (hole), trueto; (med.), pulsobato; (tremor), ek'tremo, tra'; travibro.
——, **to,** ektrem'i-igi, tratrem'i-igi, travibr'i-igi; (bore), (tra)bori.
thrips (insect), fisopodo.
thrive, to, kreski, kreskegi, multegiĝi, prosperi.
thriving, kreskanta, prosper'a-anta.
throat, gorĝ'o-a; (gullet), glutejo.
——," "**swallowing down the wrong,** laringe englutanta.
——, **to clear the,** kraĉotusi.
——, **to cut the,** tranĉi la gorĝon.
throb, a, pulsobat'o-ego.
——, **to,** pulsobat'i-egi.
throbbing, a, pulsobat'ado-egado.
throe, agonio, ekdolorego.
throne, tron'o-a.
——, **to ascend the,** atingi la tronon, reĝiĝi.
throne-room, trona ĉambro.
throng, amaso, svarmo; (crush), interpremo, premado.
——, **to,** amasiĝi, svarmi, sin puŝi amase.
thronging, a, interprem'o-ado, svarmado.
throttle, spirtubo.
——, **to,** premsufoki.
through, tra; (by means of), per; (for the sake of), pro.
——, **right,** trae, tute tra.
——, **to creep** (*or* **crawl**), trarampi.
——, **to fiddle,** traviolonti.
——, **to go,** trairi.
——, **to journey,** travojaĝi.
——, **to let pass,** tralasi.
——, **to look,** trarigardi.
——, **to pass,** trapasi; (live), travivi.
——, **to put,** trameti.
——, **to see,** travidi.
——, **to travel,** traveturi.
—— **that** (by), per tio.
—— **which** (*or* **what**), per (*or* tra) kiu (*or* kio).

throughout, trae, tute tra.
throw (subs.), (ek)ĵeto.
—— **about** (here and there), diĵeti.
—— **across, to**, transĵeti.
—— **at, to**, alĵeti.
—— **away, to**, forĵeti.
—— **down**, deĵeti, faligi, malsupren ĵeti; (overturn), renversi.
—— **in, to**, enĵeti.
—— **off, to** (as steam), ellasi.
—— **oneself headlong**, sin ĵeti kapantaŭe.
—— **oneself, to**, sin ĵeti.
—— **oneself upon, to**, sin ĵeti sur.
—— **open, to**, (ek)malfermi.
—— **out, to**, el'ĵeti, for'.
—— **over, to**, superĵeti; (across), transĵeti; (forsake), forlasi; (office), eksiĝi, forĵeti oficon.
——, **to**, (man)ĵeti.
——, **to begin to**, ekĵeti.
—— **together, to**, kunĵeti.
—— **under, to**, subenĵeti.
—— **upon, to**, surĵeti.
throwing, ĵet'o-ado.
thrown down, to be, renversiĝi.
thrown-out material, forĵetaĵo.
thrush (bird), turdo; (med.), afto.
thrust, puŝ'o-ego.
—— **back, to**, repuŝi.
—— **in, to**, en'puŝi-ŝovi; (stop), enŝtopi.
—— **oneself upon, to** (intrude), trudi sin al.
—— **out, to**, el'peli-puŝi-ŝovi, for'ŝovi-puŝi-peli.
thumb, polekso, dika fingro.
thumb-screw (mech.), flugilŝraŭbo; (torture), dikfingra turmentilo.
thump, puŝ'ego, frap'.
thumping (big), grand'a-ega.
thunder, tondr'o-a.
——**'and lighten, to**, fulmotondri.
——, **to**, tondri.
——, **to begin to**, ektondri.
thunder-and-lightning, fulmotondro.
thunderbolt, fulmofajro.
thundering-ly, fulmotondr'a-e, laŭteg'a-e.
thunderstorm, fulmotondro.
thunderstruck, fulmofrapita; (met.), miregigita.
Thursday, ĵaŭdo.
thus, tiel-e, tiamaniere.
—— **for example**, tiel ekzemple.
thwart (boat), rembenko.
——, **to**, kontraŭstari, malsukcesigi.
thy, cia-n; (your), via-n.
thyme, timiano.
thymol, timolo.
thyrsus (bot.), tirso.
thyself, thou, ci-n (*or* vi-n) mem.
tiara, tiaro.
tibia, tibio.
tic (med.), neŭralgio vizaĝa.
tick (clock, etc.), tiktako, taktbato; (insect), iksodo.
——, **to**, tiktaki, taktbati.
tick-tacking, tiktak'anta, taktbat'.
ticket, bileto; (label), surskribeto.
——, **interest-** (coupon), kupono.
——, **return-**, irorevena bileto, bileto de iro kaj reveno, ambaŭira bileto.
——, **to**, biletfiksi; (number), numeri.
ticket-of-leave, kondiĉa forpermeso (punlaborula).
—— —— **person**, reliberigito (subkondiĉa).
ticking (drill), dreliko.
——, **bed-**, tiko.
tickle, tikli, amuzi.
tickling, a, tiklo.
ticklish, tiklosent'ema, tikliĝ'; (critical), kriz'a-eca.
tidal ebb, forfluo.
—— **flow**, alfluo.
tide, tajdo, mar'fluo-movo, alfluo kaj forfluo.
——, **high**, alta maro.
——, **low**, malalta maro.
tidings, sciaĵo, sciigo-j, sciigaĵo-j; (news), novaĵoj.
——, **bearer of**, sciaĵportanto, sciiganto.
tidy, pura, neta, bonorda; (cleanly), purema; (orderly), bonord(ig)ema; (pretty), beleta.
tie, lig'o-ilo, rubando; (cravat), kravato; (equality), egal'nombro-aĵo-eco-finigo; (match against), konkurso.
—— **again, to**, religi.
—— **in a knot, to**, tuberligi.
—— **round, to**, ĉirkaŭligi.
——, **to**, ligi.
——, **to begin to**, ekligi.
—— **to, to**, alligi.
—— **together, to**, kunligi.

tie underneath, to, subligi.
—— **up, to** (attach), alligi; (knot), tuberligi.
—— **with ropes, to,** ŝnurligi.
tied, ligita.
—— **together,** kunligitaj.
tier, vico.
tierce, tercio; (barrel), barelego.
tiff, malpac'eto, koler'.
tiffin, lunĉo.
tiger, tigr'o-a.
tigerish, tigr'a-eca.
tight-ly, firm'a-e; (at a bargain), parcimoni'a-e, preciz'a-e; (narrow), malvast'a-e; (taut), strečit'a-e.
tight (impenetrable), nepenetrebla; (naut.), firma, fortika; (pressed), kunpremita; (without leak), sen'fenda-trua.
tighten, to (press), kunpremi; (stretch), streči.
tightly-fitting, ĝustalfarita.
tightness (impenetrability), nepenetrebleco.
tigress, tigrino.
tile (for stoves, paving, etc.), kahelo.
——, **floor-,** plankbriketo.
——, **roof-,** tegolo, tegmentbriko.
tile-kiln, tegolfabriko.
tile-maker, tegol'fabrikisto-faristo.
tiler, domkovr'isto, tegment'.
till, ĝis.
—— **now,** ĝis nun, ĝisnun'a-e.
—— **then,** ĝis tiam (*or* ĝis tiu tempo).
——, **to,** kulturi, prilabori; (plough), plugi.
tillage, terkultur'o-ado-ajo, plug'artado, kulturigo.
tiller (naut.), direktilo.
tilt, a (cover), tend'kovrilo-ŝirmilo; (push), (lanc)puŝo; (slope), klin'igo-eco.
——, **to,** lancbataleti, fari turniron.
tilt-waggon (family), venturtendo.
tilting, a (tournament), turniro.
timber, lign'o-a.
——, **to square,** kvadratigi trabojn (*or* lignon).
timber-merchant, lignisto.
timber-work, ĉarpent'ajo, trab'.
timbers (framework of a house), ĉarpent'ajo, trab'.
time temp'o-a; (death), mort'horo-otempo; (in general), la tempo; (life), (viv)tempo; (mus.), tempomezuro; (occasion), fojo; (space of), daŭro, tempospaco.
time, a first, unuafoje (*or* unuan fojon).
——, **a long,** longtempe.
——! **a second** (encore), bis!
—— **after time,** fojon post fojo, foje kaj ree.
—— **afterwards, a long,** longatempe poste.
——, **all the,** la tutan tempon, dum la tuta tempo, ĉiam-e.
——, **an unseasonable,** malĝustatempo.
——, **at any,** iatempe (ajn); (occasion), iafoje ajn.
——, **at one** (occasion), per unu fojo.
——, **at that,** tiam.
——, **at the right,** je l'ĝusta tempo, ĝustatempe.
——, **at the same,** samtempe, kune kun.
——, **at the wrong,** malĝustatempe, ne en sia tempo.
——, **at this very,** nuntempe.
——, **at what,** kiam.
——, **before one's,** antaŭtempe, antaŭ sia tempo.
—— **being, for the,** provizor'a-e, dum la estanta tempo, tiutempe.
——, **by this,** jam, nun, ĉe la nuna tempo.
——, **each** (*or* **every**), ĉiufoje, ĉiam.
——, **for a long,** de longe, jam de longe, longan tempon.
—— **for reflection,** tempo por pripensi (*or* pripensado).
——, **for the first,** unuafoje.
—— **for, to have,** havi tempon por.
——, **in,** ĝustatempe; (mus.), laŭtakte.
——, **in due,** sia'tempe, ĝia', ĝusta'.
——, **in good,** frue, ĝustatempe.
——, **in the nick of,** je l'ĝusta tempo, ĝustatempe.
——, **interval of,** intertempo.
——, **just in,** ĝustatempe.
——, **many a,** multafoje.
——, **not at the proper,** neĝustatemp'a-e.
—— **of day,** la horo; (salutation), saluto.
—— **of, in the,** en la tempo (*or* epoko) de.
——, **of one,** unufoja.

time, of some other, alitempa, malnuna.
——, **of that,** tiama.
——, **of year,** jartempo.
——, **once on a,** iam, foje.
——, **out of,** malĝustatempe.
—— **out of mind,** de antikva tempo, de longege, de nememorebla tempo.
——, **passing of one's,** pasigado de l'tempo.
——, **person of that,** tiamulo.
——, **play-,** ludtempo.
——, **point of** (math.), tempopunkto.
——, **portion of** (math.), tempero.
——, **since that,** de tiam.
——, **some-** (*or* **any-**), iam (ajn).
——, **spare-,** libera tempo, libertempo.
——, **the present,** la estanta (*or* nuna) tempo.
——, **this,** tiučifoje, ĉi-tiufoje.
——, **three-four** (mus.), tritempa takto.
——, **till the present,** ĝis nun.
——, **to act against,** kontraŭkuri la tempon.
——, **to beat,** bati la takton.
——, **to come at the right,** veni en la ĝusta tempo.
——, **to come in,** veni en ĝusta tempo (*or* ĝustatempe).
——, **to keep** (clock), ĝuste funkciadi, iri egale.
——, **to kill,** plezure elspezi (*or* pasigi) la tempon, malenuigi sin.
——, **to lose,** perdi la tempon; (clock), malrapidi.
——, **to set to the same,** akordigi.
——, **to sing in,** ĝustatakte kanti, laŭtakte kanti.
—— **to time, from,** iam kaj iam, de tempo al tempo.
——, **up to,** ĝustatempe.
—— **when, at the,** en la tempo de (*or* en la tempo kiam).
—— **when, every,** ĉiufoje (*or* ĉiun fojon) kiam.
time-exposure (phot.), daŭra espozo (*or* daŭra kapto).
time-limit, templimo, limtempo.
time-reckoning, tempkalkulo.
time-server, oportun'ulo, ventoflag'.
time-table, plano de veturoj, horaro
timely, ĝustatempa; (opportune), temporesponda.
timepiece, horloĝo; tempo'montrilo, hor'.
times, at, ia'foje, kelka'; de tempo al tempo.
——, **at various** (*or* **at different**), diversfoje.
——, **many,** multafoje.
——, **of primitive,** el tempoj primitivaj.
——, **of the,** laŭtempa.
——, **old,** antikvaj tempoj.
——, **prehistoric,** pra'epoko-tempo.
——, **primitive,** primitivaj tempoj.
——, **several,** kelkafoje.
timid-ly, timem'a-e, malkonfidem'a-e.
timidity, tim'o-emeco.
timon, timono, direktilo.
timoneer, timon'isto, direktil'.
timorous-ly, timem'a-e, malkonfidem'a-e.
timorousness, timemeco.
tin, stan'o-a.
" —— " (money), mono.
——, **a food-** (*or* **fruit**), konservujo.
——, **to,** stan'i-umi.
——, **to re-,** restan'i-umi.
tin-box, lada skatol'o-eto.
tin-plate, (fer)lado.
tin-tack, stanumita najleto.
tincture, tinkturo; solv'aĵo, alkohol'; (colour), koloro; (smattering), kon'eto, sci'.
tinder, tindro, fajrfungo, meĉaĵo.
tinder-box, meĉaja skatolo, fajrilaro.
tinfoil, stanfolio, folia stano.
tine, korneto.
tinge, kolor'o-eto.
——, **to,** kolor'igi-etigi.
tinged, koloretigita.
tingle, to, pikpiki.
tingling, a, pikpikado.
tinker, lutisto (bolila); (botcher), fuŝ'anto-isto; (solderer), ladisto.
tinkle, to, tinti, sonoreti.
tinkling, metallic, tinta bruo.
tinman, stan'isto, lad'.
tinsel, kupra papero.
tinsmith, ladisto.
tint, kolor'o-eto; (shade), nuanco.
——, **to,** koloretigi; (shade), nuanci.
tinted, kolor'ita-etita.
tiny, malgrand'a-eta; (pretty), beleta, gracia.

tip, pinto; (gift), (kutima) donaco; (money for a drink), trinkmono.
——, **metal-** (of walking-stick), bastonpinto, bastona pintŝirmilo.
——, **to** (earth, etc.), disŝuti; (point), pintigi.
tippet, pelerino, manteleto.
tipping (of earth, etc.), disŝut'o-ado.
tippler, drinkulo.
tipsy, ebria.
——, **rather**, ebrieta, en gaja stato.
tiptoe, on, piedpinte.
——, **to stand on**, stari sur la piedpintoj.
tiptop, bonega.
tirade, riproĉ'fluo, insult'.
tire out, to, lacegigi.
——, **to**, lac'igi-iĝi, enu'i-igi.
tired, lac'a-igita.
—— **out**, lacega.
tiredness, lac'eco-iĝo.
tireless-ly, nelacigebl'a-e, senlac'a-e.
tirelessness, nelacigebleco.
tiresome-ly, enuig'a-e; (obtrusive), trudem'a-e.
tiresomeness, enu'igeco, ĝen'.
tiring, laciga.
tissue (anat.), histo, teksaĵo, membrano; (woven), teksaĵo.
——, **conjunctive**, kuniga histo.
——, **gold and silver**, orarĝenta teksaĵo.
—— **paper**, maldikega papero.
tit-bit, elekt'aĵo, bongust'.
titan (myth.), titano.
titanium (chem.), titanio.
tithe, dekon'o-ofero.
titillate, to, tikli; tremagit'iĝi, agitet'.
titillation, tikl'ado, tremagit'.
title, titolo.
—— **of courtesy**, ĝentileca (*or* nedeviga) titolo, honora nomo.
title-deed, dokumento de l'aĉeto, titola dokumento, titolaĵo.
titmouse, paruo.
titration (chem.), titrado.
——, **to subject to action of**, titri.
titre (standard—phys.), titro.
titter, a, subrido.
——, **to**, subridi.
tittle, punkteto.
——, **to a**, procize tiel.
to (for to), por; (in), en; (on *or* over), sur; (opposition), kontraŭ; (place of), ĉe; (that you . . .), ke; (under), sub; (until), ĝis; (with), kun.
to and fro, walking, al- kaj el-irado.
—— **be**, esti.
—— **that**, al tio.
—— **the ground**, teren.
—— **the purpose**, alcela.
——, **up**, ĝis.
—— **what** (*or* **which**), al kio (*or* kiu).
to-day, hodiaŭ.
——, **until**, ĝis hodiaŭ.
to-day's (adj.), hodiaŭa.
to-morrow, morgaŭ.
——, **the day after**, postmorgaŭ.
to-morrow's, la morgaŭa.
to-night, hodiaŭ vespere (*or* nokte).
toad, bufo.
——, **orange-speckled**, bombinatoro.
toast (bread), panrostaĵo; (sentiment), tosto.
—— **and dripping**, grasa panrostaĵo.
——, **to** (health), tosti; (roast), (al)rosti.
toasted bread and butter, butera panrostaĵo.
—— **bread dipped in wine**, vina panrostaĵo.
—— **bread, over-**, (pan)rostegaĵo.
toaster (grid), kradrostilo.
toasting fork, rostilo.
tobacco, tabak'o-a.
——, **leaf-**, folia tabako.
tobacco-box, tabakujo.
tobacco-jar, tabakujo.
tobacco-market, tabakvendejo.
tobacco-plant, tabakokreskaĵo.
tobacco-pouch, tabakujo.
tobacco-shop, tabakbutiko.
tobacco-warehouse, tabaktenejo..
tobacconist, tabakvendisto.
tocology, akuŝa scienco.
tocsin, tumultsonorilo.
toddle, infanpaŝi, paŝeti.
—— **off, to**, infan'paŝeti, for'.
toe, piedfingr'o-a.
——, **big**, halukso, dikpiedfingro.
toffy, butersukeraĵo.
together, kune, amase.
——, **all**, ĉiuj kune.
——, **to bring**, amas'igi, kunven'; kolekti.
——, **to live**, kunvivi.

together, to rake, kunrasti.
—— **with,** kune kun.
toil, pen'o-eg'o-ado, labor'o-ado.
——, **to,** pen'i-eg'i-adi, labor'i-adi.
——, **without,** sen'pene-labore.
toiler, labor'anto-isto.
toilet, tualet'o-a.
——, **articles for the,** galanteria komercaĵo.
——, **ball-room-,** balvest'o-aĵo.
toilet-room, tualetejo.
toilette, accessory of the, galanterio.
——, **to make the,** fari tualeton.
toilette-powder, pudro.
toilsome, pen'plena, labor'.
token, signo, marko; (coin), kvazaŭmonero; (confirmatory), versigno; (memorial), memorigaĵo.
—— **of, in,** kiel signo de.
—— **whereof, in** (leg.), kiel atestaĵo de kio, por atesti kion.
tolerab'le-ly, tolerebl'a-e; (middling), nemalbon'a-e.
tolerance, toler'o-ado; (med.), toler'ado-kapablo-eco.
——, **of,** tolera.
tolerant, tolerema.
tolerate, to, toleri.
toleration, tolerado.
toll, depago, urbimposto.
——, **to,** sonorigi (funebre).
toll-bar, depaga barilo, depagejo.
toll-collector, depag'isto, impost'.
toll-house, limdepag'ejo, urbimpost'.
tolling, funebra sonor'ado-igado.
tomcat, katviro, kato-viro.
tom-tit, paruo.
tom-tom, tamtamo.
tomahawk, milithakileto.
tomato, tomat'o-a.
tomb, tombo, ĉerkujo.
tombak, tombak'o-a.
tombola, tombolo, loterio.
tombstone, tombŝtono, tombo ŝtono, surtomba ŝtono.
tome, volum'o-ego.
tomfoolery, malsag'aĵo, malsprit'.
ton, tuno.
tonality, toneco.
tone (mus. and phot.), tono; (style), stilo.
——, **false,** falstono.
——, **half-,** duontono.
tone of command, komando'tono, ordono'.
——, **of the same,** sam'sona-tona.
——, **to** (phot.), ton'igi-iĝi.
—— **to, to give a,** ton'igi-doni al.
tongs, fajroprenilo.
——, **small,** prenileto.
tongue, lango; (speech), lingvo, idiomo; (in a reed *or* pipe), langeto.
—— **of land,** landlango.
——, **pickled,** peklita lango.
——, **to give,** ekboji.
——, **to hold one's,** silenti (pri).
——, **under the,** sublanga.
——, **vein of the,** langovejno.
tongue-tied, langoligita; (fig.), muta, silentigita.
tonic (adj.), fort'iga, fortik'.
——, **a** (med.), fort'igilo, fortik'.
—— **accent,** tona (*or* tonika) akcento.
—— **solfa,** tonika notkantado.
toning and fixing material, fikstonigilo.
—— **solution** (*or* **material**), tonigilo.
tonnage, enhavebl'eco, tun'; tunkvanto.
tonometer (phot.), tonometro.
tonsil, tonsilo.
tonsilar, tonsila.
tonsilitis, tonsilito.
tonsilotome, tonsiltranĉilo.
tonsilotomy, tonsilotomo.
tonsorial, hartonda.
tonsure, tonsuro.
——, **to give the,** fari monahon.
tonsured, tonsurita.
tontine, tontin'o-a.
too (also), ankaŭ; (excess), tro.
—— **much,** troe.
—— **much** (*or* **many**) **of,** tro da.
tool, ilo, instrumento, uzaĵo.
tools, set of, ilaro.
tooth, dent'o-a.
——, **canine** (*or* **corner**), kojna dento, akradento.
——, **molar,** vanga dento.
tooth-brush, dentobroso.
toothache, dentodoloro.
toothed, dent'a-ita-hava.
—— **border,** dent'aro-rando.
——, **eight-,** okdenta.
——, **gap-,** dentmanka.
——, **not,** sendenta.

toothed, one-, unudenta.
—— **rack**, dent'aro, sulket'.
—— **work**, dentaro.
toothed-wheel, dentrado.
toothless, sendenta.
—— **person**, dentmank'ulo, sendent'.
toothlessness, sendenteco.
toothpick, dentopurigilo, dent'ligneto-plumaĵeto.
toothsome, bongusta.
toothsomeness, bongusteco.
toot, to, trumpeti, tubsoni; tubo'-blovi, trumpet'.
tooting, trumpet'ado, tuboson'.
top- (prefix), ĉef-.
top, supro; (adj.), supra, ĉefa; (first), unua; (gable), frontono; (naut.), topo; (of bed), litbaldakeno; (of boot), supraledo; (of head), verto, hardisiĝo; (of turnip), herbaĵo; (point), pinto; (surface), supraĵo; (toy), turbo, turnoludilo; (wool), porŝpinaĵo, lan'kombitaĵo-fadenaro, ŝpinpreta lano.
——, **humming-**, zuma turnludilo.
—— **off, to knock the**, senpintigi.
——, **to** (excel), superi; (lop), sensuprigi.
top-full, plenega.
topaz, topaz'o-a.
topee, korkokasko.
toper, malsobr'ulo, drink'.
Tophet, la infero.
topic, temo; (med.), topik'o-a.
topical, tema.
topmast, topmasto.
topmost, plejsupra.
topographical-ly, topografi'a-e.
topography, topografio.
topology (math.), topologio.
topping, hartufo, vertharoj; (lopping), sensuprigo.
topple, to, fali renverse, malsuprenfali.
topsail, topvelo.
topstone, supraŝtono.
topsy-turvy, renversite, kapmalsupre.
—— ——, **to turn**, renvers'i-iĝi.
toque, vesta kapornamo; (plaited all round), ĉapo.
torch, torĉo (peĉa).
torch-holder, lum'ingo, torĉ'.
toreador, toreadoro.
torment (harassment), turmento, ĝeno; (torture), turmentego.
——, **garment of**, turment'vesto, pun'.
—— **oneself, to**, memturmenti, turmenti sin.
——, **to** (tease), inciteti; (torture), turmentegi; (worry), turmenti.
tormenting-bench, turment'igilo, martir'.
torn, ŝirita.
—— **away, a becoming**, deŝirigo.
—— **away, to become**, deŝiriĝi.
—— **round**, ĉirkaŭŝirita.
torn-off piece, deŝirajo.
tornado, turnoventego, uragano.
torpedo, torped'o-a; (fish), torpeda fiŝo.
——, **to**, torpedi.
torpedo-boat, torpedoŝip'o-eto.
torpid-ly, sen'senta-mova, rigid'a-e.
torpid, to become, sen'sentiĝimoviĝi.
torpidity, sen'senteco-moveco.
torpidness, sen'senteco-moveco.
torpor, sen'senteco-moveco.
torrent, torento, fluanta akvomaso.
torrid, varm'ega, sek'.
torsk, moruo, brosmio.
torsion, tord'o-eco; (math.), tordeco.
——, **angle of**, tordecangulo.
——, **radius of**, tordecoradio.
torso, torso.
torticollis, kol'doloro, nuk'.
tortoise, testud'o-a.
tortoise-shell, kiraso de testudo, testuda ŝelo.
tortuosity, tord'eco-aĵo.
tortuous-ly, tord'a-ec'a-e.
tortuous curves (math.), neebenaj kurboj.
tortuousness, tordeco.
torture, turmentega esploro, turmentego.
——, **to**, turmentegi.
torture-chamber, turmentegejo.
torus (math.), toruso.
Tory, (el)konservativa.
——, **a**, (el)konservativulo.
Toryism, (el)konservativismo.
toss, a, suprenjeto; (bull), kornojeto.
—— **away**, forjeti.
—— **in, to**, enjeti.
——, **to**, jeti; (gambling), vet'jeti, lud'; (shake), skui.

toss together, to, kunjeti.
—— **upon, to,** surjeti.
tossing, a, sku'o-iĝ'o-ado.
total-ly, tut'a-e.
total (math.), sumo, kiomo.
——, **the sum,** la tuto, la sumo.
—— **up, to,** sumi.
totality, tuteco.
totter, to, šanceliĝi.
tottering, šanceliĝ'a-anta, falema.
toucan, ramfasto.
touch, tuŝo; (sense of), la palpado.
——, **a, with a brush,** peniktuŝeto.
—— **at, to,** alveni al, albordiĝi, en'veni-veturi.
——, **by,** palpe.
——, **finishing,** laata perfektigo.
—— **lightly, to,** tuŝeti.
—— **one another, to,** intertuŝiĝi.
—— **the edge, to** (land), albordiĝi.
——, **to,** tuŝi; (as a tangent), tangi; (feel), palpi; (the heart), kortuŝi; (the mark), trafi.
—— **up, to,** (tuŝ)korekti.
—— **upon, to,** tuŝeti parole, priparoleti.
—— **with a brush, to,** peniki.
touch-judge (football), linijuĝisto.
touch-wood, fajrofungo, meĉajo.
touched, to be, kortuŝiĝi.
touchiness, ofendsent'emeco, incit'.
touching (concerning), tuŝant'a-e; (emotions), kortuŝant'a-e; (with reference to), pri; (with the fingers), palp'anta-ado.
——, **to feel by,** senti palpe.
touchy, ekkoler'ema, incit', ĉagreniĝ'.
tough-ly (hard), malmol'a-e; (persistent), persist'a-e.
tough, kunten'ema-eca, malfacilrompebla; (tendon-like), tenden'eca-simila; (viscous), viskoza.
toupet, hartufo, vertharoj.
tour, rondvojaĝo.
touring club, turingklubo.
tourism, turismo.
tourist, tur'isto, rondvojaĝ'.
tournament, turniro, konkurso.
tourney, turniro.
tourniquet, turnkrucо; vejn'premilo, arteri'.
touse, to, taŭzi.
tousled, taŭz'ita, senordig'.
tout, a, klientserĉisto.
——, **to,** klientserĉi.
tow, stupo.
——, **in,** postotrene.
——, **to,** posto'treni-tiri.
tow-rope, trenkablo.
toward-s, al.
toward (ready), preta.
towards (nearly), proskaŭ, ĉirkaŭe.
towel, viŝtuko, manviŝilo.
——, **small,** tualetotuko.
tower, a, turo.
—— **above, to,** superstari.
——, **church-,** preĝeja turo.
——, **principal,** ĉefturo.
——, **watch-,** observoturo, gardostara turo.
tower-building, turkonstruado.
towing, trenado, postotren'o-ado.
towing-cable, tren'kablo-šnurego.
towing-vessel (tug), trenŝipo.
town, urb'o-eto.
——, **market-,** urbeto (vendeja).
town-council, urba konsilantaro, urbestraro.
town-crier, publika anoncisto.
town-hall, urbestrara domo, urbdomo.
town-limits, teritorio (urba), urblimoj.
townsman, urbano, burĝo.
——, **fellow-,** samurbano.
toxic, toksa, venena.
toxicum, toksaĵo, veneno.
toy, ludilo.
trace, postsign'o-eto; (footprint), pieda postsigno; (horse), tirilo.
——, **to** (a design), surkopii; (by scent), post'flari-senti; (draw), desegneti; (horses), posto'treni-tiri.
trace-horse, antaŭ'ĉevalo, tren'.
trachea, traheo, trakeo.
trachyte, trakito.
trachytic, trakita.
tracing-paper, diafana (surkopia) papero.
track, post'signo, voj'; (furrow), sulkaĵo.
——, **to,** post'flari-senti.
——, **wheel-,** rad'sulko, voj'.
trackless, sen'vojeta-postsigna.
tract, traktat'eto, broŝur', libr', verk'; (anat.), traktuso; (region), regiono.
tractable, obeema.
——, **to make,** obeigi.
tractableness, obeemeco.

traction, tren'o-ado, tir'o-ado.
——, **electric**, elektra trenado.
traction-engine, lokomobilo.
tractional effort, trena penado.
tractory (*or* **tractrix**) (math.), traktorio.
trade, komerc'o-a, negoc'o-ado-a; (industry), industrio; (handicraft), meti'o-a; (prof.), profesi'o-a.
—— **articles**, komercaĵaro.
——, **free-**, libera interŝanĝado.
——, **stock in**, (komerc)provizo, komercaĵo.
——, **to**, komerc'i-adi, negoc'i-adi; (bargain), marĉandi; (exchange), interkomerci, elŝanĝi.
——, **to follow a**, praktiki metion.
trade-mark, fabrikmarko.
trader, komercisto; (large), negoc'isto, afer'.
tradesman, butik'isto, komerc'; (saleaman), vendisto.
trading, komerc'o-ado, negoc'o-ado.
——, **to carry on dishonest**, malhoneste komerci.
tradition, tradicio.
traditional-ly, tradici'a-e, laŭtradici'a-e.
traduce, to, kalumnii, malbone paroli pri.
traffic (business), komerc'o-ado, negoc'o-ado; (carrying), portado; (intercourse), inter'komunikiĝorilatoj; (street, etc.), stratiradoj.
——, **to**, komerci.
trafficker, vend'istaro, afer'.
tragacanth, traganto, traganta gumo.
tragedian, tragediisto.
tragedy, tragedio.
tragic-ally, tragedi'a-e.
trail (footprints, etc.), postsigno-j.
—— **away, to**, for'tiri-treni.
—— **over, to**, supertreni.
——, **to**, tren'i-iĝi.
train (explosive), eksplodlinio; (gown), (vesto)trenaĵo, trenaĵo de vesto; (of carriages other than railway), veturilaro; (procession), ir'antaro, sekv'; (railway), vagonaro.
—— **badly, to**, malbone eduki; (spoil), eldorloti.
——, **by fast**, rapidire.
——, **by goods** (*or* **slow**), malrapidire.
—— **I get into the**, envagoniĝu!
train, military-, milit'ilaro, batal'.
——, **to** (aim), celdirekti; (break in), dresi; (rear), eduki; (trees, etc.), kreskodirekti.
——, **to go by**, vagonar'iri, fervoj'; veturi vagonare (*or* fervoje).
——, **to take the**, forveturi, envagoniĝi.
trained, well-, bonedukita.
trainer, a, pretigisto; (horse-breaker, etc.), dresisto.
training, eduk'ado, kultur', pretig'; (acquired), edukit'eco, ĝentil'; (of animals), dresado.
trait, trajto.
traitor-ess, perfidul'o-ino, perfidint'o-ino.
traitorous-ly, perfid'a-e.
traitorously disposed, perfidema.
traitorousness, perfideco.
trajectory (math.), trajektorio.
tram-rail, tramrelo.
tramcar, tram'veturilo-ĉaro.
trammel, bar'ilo, haltig', malhelp'.
——, **to**, malhelpi.
tramp (of the feet), batbato de l'piedoj.
——, **a**, vag'isto-emulo.
—— **about, to**, vag'i-adi.
——, **to**, piediri.
trample, to, pied'premi-obati, premi per la piedoj.
trampling, pied'batado-frapado.
tramway, tramvoj'o-a.
trance, ravo, ŝajnmorto; (ecstasy), ekstazo; (med.), katalepsio, rigidmanio.
tranquil-ly, trankvil'a-e.
tranquillity, trankvil'o-eco.
tranquillize, to, trankviligi.
trans- (prefix), trans-.
transact, fari, trakti pri.
transaction (agreement), interkonsento; (business), negoc'o-ado; (monetary), spezo.
——, **small**, negoceto.
transcendental-ly (math. and phil.), transcend'a-e, metafizik'a-e.
transcribe, to, trans'skribi-kopii.
transcript, kopio, transskribaĵo.
transcription, transskrib'o-aĵo.
transept, transepto.
transfer, a, trans'porto-dono, cedo.
——, **account of**, girokonto.

transfer, to, trans'porti-loki-doni ; (phot.), reporti, depreni.
transfer-bank, ĝirobanko.
transfer-paper (phot.), reporta papero.
transferee, ricevanto.
transference, transport'o-ado, transdon'o-ado.
transferor, transdonanto.
transferred, to be, trans'lokiĝi-doniĝi.
transferring, a, transdono ; (phot.), reporto.
transfiguration, alifigur'igo-iĝo, beleg'igo-iĝo.
transfigure, to, alifigurigi, belegigi.
transfix, to, tra'bori-piki.
transform, to, aliec'igi, ali', aliform' ; ŝanĝi ; (math. and mech.), transformi.
transformable, aliform'igebla, ali'.
transformation, aliform'igo - iĝo, ali'igo-iĝo.
transformation - scene, mirtea-trajo.
transformator (electr.), transformatoro.
transformed, to be, aliform'iĝi, ali'.
transfuse, to, transfluigi.
transfusion, transfluigo.
transgress, to, transpaŝi, malobei (al la leĝo), agi kontraŭ, peki.
transgression, transpaŝo, pek'o-ado.
transgressor, transpaŝinto, pekant'o-ino.
tranship, transŝarĝi.
transhipment, transŝarĝ'o-ado.
transient-ly, temp'a-e, pas'em'a-e, percem'a-e, kelkatemp'a-e.
transit, trans'iro-veturo.
——, **in,** transire.
—— **instrument,** meridia teleskopo.
transition, transir'o-ad'o-a.
——, **state of,** transirstato.
transitive-ly, transitiv'a-e.
transitory, pas'ema, pere' ; tempa ; transir'ema, malaper' ; rapidflua, preteriranta, kelkatempa.
transitu, in, transir'ante-e.
translate, to, traduki ; (remove), transkonduki.
translation, traduk'o-ado ; (math.), translacio ; (phys.), antaŭenmovo, senrotada movo.
——, **piece for,** tradukotajo.
translator, traduk'isto-anto.
translucence, lumtrairebl'eco, tralum'.
translucent, lumtrair'ebla, tralum'.
transmarine, trans'mara-oceana.
—— **country,** transmarlando.
transmigrate, to, transmigri.
transmigration, transmigr'o-ado.
transmission, trans'sendo-dono ; (tech.), transmisio.
——, **cost of,** transsenda kosto (*or* pago).
transmit, to, transsendi, trans'doni-igi ; (by descent), heredigi.
transmitted, to become, transiĝi.
transmitter, trans'sendilo-donilo.
transmutation, transŝanĝ'o - ado, alisenc'igo-iĝo, aliform'igo-iĝo.
transmute, to, transŝanĝi, alisenc'igi, aliform'.
transom, inter'trabo-kolono, tradividilo.
transparency (quality), diafan'eco, travidebl'.
transparent-ly, diafan'a-e, travidebl'a-e.
transparent, to become, diafaniĝi.
——, **to render,** diafanigi.
transpierce, to, trap'iki-bori.
transpiration, ŝvit'o-ado.
transpire (perspire), ŝvit'i-eti, ellasi ; (to become known), malsekretiĝi.
transpired, it has, estas ekscliita.
transplace, to, translokl.
transplant, transplanti ; (remove), trans'loki-loĝigi.
transport, veturigado ; (any means of), transportilo ; (carriage), transport'o-ado ; (ship), transportŝipo.
—— **by carriage, to,** veturigi.
——, **cost of,** transporta kosto (*or* pago).
——, **to,** transporti, veturigi ; (charm), ravi ; (exile), ekzili.
transportable, not, netransportebla.
transportation, transport'ado, veturig' ; (exile), ekzilado.
transports, to be in, esti ravata.
——, **to go into,** ĝojegi, raviĝi.
transpose, trans'loki-meti, ordoŝanĝi.
transposition, lokoŝanĝ'o-ado, translok'o-iĝo, ordoŝanĝo.

transubstantiation, transsubstanciĝo, substancoĉanĝo.
transudation, traŝvito.
transude, traŝviti.
transversal-ly, laŭlarĝ'a-e.
tranverse-ly, laŭlarĝ'a-e, transvers'a-e.
trap (cart), kariolo; (snare), kaptilo, enfalejo.
——, **fly-**, muŝkaptilo.
——, **mouse-**, muskaptilo.
——, **to**, enkaptiligi.
——, **to set a**, kaptilpretigi; (met.), insidi.
trap-door, plankopordo; (snare), enfalig'ilo, kapt'.
trapeze (gymnastics), svingobaro.
trapezium (math.), trapezo.
trapper, ĉas'isto, kaptil'.
trappings, horse-, ĉevala armaĵo.
——, **ornamental**, ĉevalornam'o-aĵo.
trash, forjet'aĵo, malpur'.
trashy publication, sentaŭga libro, libraĉo.
traumatic, traŭma; (remedy), vundokuracilo.
traumatism, traŭmo.
travail, pen'emeco, zorg'; (birth), naskdoloro.
——, **to**, naskdolori, suferi naskdolorojn.
travel (in general), la vojaĝado, turismo.
—— **across, to**, transveturi.
—— **away, to**, forveturi.
—— **by dog-sledge**, glitveturi, veturi hunde.
—— **by road**, vojiri.
—— **far, to** (migrate), migri.
—— **in a vehicle, to**, veturi.
—— **over** (*or* **through**), tra'veturivojaĝi.
——, **to**, vojaĝ'i-adi; (wayfare), vojir'i-adi.
—— **to, to**, alveturi.
—— **together, to**, kunveturi.
traveller, vojaĝanto; (passenger), pasaĝero.
——, **commercial**, (komerca) vojaĝisto, vojaĝa komizo.
——, **fellow**, kun'vojiranto-vojaĝanto.
travelling (adj.), vojaĝ'a-anta-ado; (mech.) malfiksa; (wayfaring), vojir'o-ado.
—— **compass**, vojira kompaso.
travelling, fond of, vojaĝema.
——, **taste** (*or* **inclination**) **for**, vojaĝemo.
travelling-companion, kunvojaĝanto.
travelling-expenses, vetur'elspezo, vojaĝ'.
traverse on foot, to, trairi per la piedoj.
——, **to**, tra'pasi-iri-veturi; (deny), nei.
travesty, travestio.
——, **to**, travestii.
trawl, skrapreto.
——, **to**, skrapret'kapti-uzi.
trawler, skrapretŝipo.
trawling, skrapretuzado.
tray, pleto; (phot.), kuveto.
treacherous-ly, perfid'a-em'a-e, insid'a-e.
treacherousness, perfideco.
treachery, perfid'o-aĵo-eco.
treacle, melas'o-a, mielsirop'o-a.
——, **to smear** (on bread), miel'ŝmiri, melaso'.
tread down, to, piedpremi, disbati per la piedoj.
—— **in, to**, enpiedobati.
—— **on, to**, sur'paŝi, ek' (sur).
—— **out**, disbati (*or* dispremi, *or* trabati) per la piedoj.
—— **over, to**, surpaŝi.
—— **through, to** (make a footpath), trabati per la piedoj.
——, **to**, bati per la piedoj; (fowls), kunpariĝi; (press), elpremi; (walk), marŝi, iri, paŝi.
—— **under foot**, premi per la piedoj.
treading, pied'frapado-premado.
treason, perfido.
——, **high-**, regna perfido.
treasonab'le-ly, perfid'a-ec'a-e.
treasonableness, perfideco.
treasure, trezoro.
treasure-chest (*or* **money-box**), kaso.
treasurer, kasisto.
treasury, trezor'ejo-ĉambro, kasejo.
——, **First Lord of the**, Ministro Financa, Regnokasisto.
——, **National**, regna kasejo.
——, **public-**, fisko.
treat, a, regalo; (enjoyment), ĝuego.
—— **for, to**, negoci (por).
—— **of, to**, pri'trakti-paroladi.

treat, to (a patient), kuraci; (conduct oneself towards), konduti kontraŭ; (a theme, etc.), trakti; (regale), regali.
—— **upon, to,** (pri)trakti.
—— **with, to,** interkonsenti kun.
treatise, traktato, disertacio.
treatment, traktado, agmaniero, konduto al; (med.), kurac'o-ado.
—— **by spells,** sorĉa kuraco.
——, **of** (med.), kuraca.
treaty, trakt'aĵo-ato, interkonsento.
——, **a closed,** fermita traktato.
——, **authorised text of,** rajtigaĵo.
——, **governmental adoption of a,** rajtigo de traktato.
——, **open,** nefermita traktato.
——, **to be in,** trakti.
treb'le-ly, triobl'a-e.
treble (mus.), sopran'o-a.
——, **to,** triobl'igi-iĝi.
tree, arb'o-a.
——, **hollow of a,** kav'o-aĵo de arbo.
——, **to uproot a,** elradiki (*or* elŝiri) arbon.
tree-felling, arbfal'igo, senarb'.
treenail, ligna najlo.
trees, to clear of, senarbigi.
trefoil, trifolio.
trellis, latiso, plektaĵo, krado, (ligna) retaĵo.
trellis-work, palisplektaĵo.
tremble, to, tremi; (shake), skuiĝi.
——, **to begin to,** ek'tremi-skuiĝi.
trembling-ly, trem'a-ant'a-e.
trembling, a, trem'o-ado.
—— **with fear,** timtremant'a-e.
tremendous-ly (enormous), grand-eg'a-e; (fearful), timegind'a-e, timig'a-e; (monstrous), monstr'a-e; (terrible), terur'a-e; (vast), vast'a-eg'a-e.
tremor, tratremeto, tremado, skuetiĝo.
——, **to feel a,** ektremi.
trench, tranĉeo, longofoso.
—— **for drainage,** defluilo.
trenchant-ly, akr'a-e, tranĉ'a-ant'a-e.
trencher, plado (ligna).
trepan, to, kranibori.
trepanning instrument, kraniborilo.
trepidation, tremomov'o-ado, trembalanciĝo; trem'ado, skuetiĝ'.
trespass, transpaŝo, peko.
——, **to,** transpaŝi, peki.
trespasser (land), **transpaŝinto**; (sinner), pekul'o-ino.
tress, harligo, (har)plektaĵo.
——, **to,** plekti.
trestle, subportilo; (stand), stablo.
tret, rubrabato.
triad, tri'o-ulo-aĵo.
trial (affliction), malĝojo, sufer'o-aĵo; (examination), ekzameno; (hearing), aŭskultado (juĝa); (investigation), esplorado; (judicial), juĝa ekzamenado (*or* esplorado); (temptation), tento; (test), provo.
—— **by jury,** ekzameno antaŭ jurintaro, jurintarekzameno.
——, **one on,** ekzamen'ato, juĝ'.
triangle, triangulo.
triangular-ly, triangul'a-e.
triangular, triangul'a-forma.
triangularity, trianguleco.
trias, trias'o-a.
triassic formation, triasa terajo (*or* formacio).
tribal, (inter)genta.
—— **chief,** gentestro.
tribe, gento; (bot.), tribuso.
tribes, people of other, aligentanoj.
tribesman, gentano.
——, **fellow-,** samgentano.
tribrach (poetry), tribraĥo.
tribulation, suferado, ĉagrenego, malĝojo.
tribune, magistrato; (pulpit), tribuno.
tribunal, tribunalo, juĝistaro.
tributary (adj.), tributpaga, depaganta.
——, **a,** tributpag'anto, depag'.
tribute, tributo, depago.
——, **paying,** tributanta.
——, **to give,** tributi.
trice, momento.
triceps (anat.), tricepso.
trick, ruz'o-aĵo; (artifice), artifiko, elturniĝo; (cards), preno; (cheat), trompo; (manner), kutimeto, maniero.
——, **taking a** (cards), prano.
—— **out, to,** ornami.
——, **to,** ruzi; (cheat), trompi, friponi.
trickery, tromp'ado-aĵo, artifiko, ruzflataĵo.
trickle, to, flueti, guti.

trickling, a, fluet'ado, gut'.
tricks, roguish, artifikoj.
trickster, ruzulo, artifikisto.
trick'y-ily, ruz'a-em'a-e, ruzflat'a-e.
tricolour, trikoloro, trikolora standardo.
tricoloured, trikolor'a-ita.
triouspid, tripinta.
tricycle, triciklo.
trident, tridento.
tried, provita, fidinda.
triennial-ly, trijar'a-e, trijardaŭra.
trifle, bagatelo; malgrand'aĵo, malgrav', senvalor', negrav', sensignif'.
——, **to,** okupiĝi per bagateloj, disamuzi sin.
—— **with, to,** mal'estimi-respekti, trakti malserioze.
trifles, given to, bagatelema.
trifling, mal'grava, ne'; malgrand'a-aja; vanta, sensignifa; (act), malrespekt'ado-montro, malserioza traktado; (disposition), bagatelema.
trigger, ellas'ilo, tir'.
——, **fall of the,** ĉanfalo.
trigonometrical-ly, trigonometri'a-e.
trigonometry, trigonometrio.
trihedral (math.), triedra.
trihedron, triedro.
trilateral, trilatera.
——, **a** (math.), trilatero.
trilingual, trilingva.
trill, a, trilo.
——, **to,** trili.
trillion, triliono.
trilobite, trilobito.
trilogy, tritragedio.
trim (ready), pret'igita, ord'; (state), stato, ordo.
——, **to** (out), ĉirkaŭtranĉi; (lamp), pretigi; (opinions), alĝustigi siajn opiniojn; (ornament), garni, ornami; (sails), al'ĝustigi-ventigi; (set in order), ordigi; (trees), branĉotranĉi.
trimester, trimonato, kvaronjaro.
trimmer (coal, etc.), ordigisto; (opinion), (opini)ŝanĝ'ulo, laŭtemp'; oportunisto; (ornament), garnist'o-ino.
trimming, garnaĵo, garnituro; (act), garn'ado, ornam'; (sails), alĝust'igado, alvent'; (toilette), galanterio; (trees), branĉotranĉ'o-ado.
trinket, pendornam'o-aĵo, juvel'o eto.
Trinity (the), (La) Triunuo.
trio, trio; (mus.), terceto.
triolet (poetry), trioleto.
trip, ekskurso; (stumble), faleto.
——, **to** (dance), saltet-iri.
——, **to take a,** fari ekskurson.
—— **up, to,** faletigi.
tripe, tripo-j, ŝafintesto.
triple, triobla.
——, **to,** triobligi.
triplet (child), trinaskito; (poetry), terceto.
tripod, tripiedo, tripieda benko.
tripoli, tripolo.
tripos, gradiĝa ekzameno (universitata).
tripper, ekskurs'anto-ulo.
triptych, triptiko.
trireme, tribenkŝipo.
trisect, tri'sekci-onigi.
trisection, trisekco.
trisyllabic, trisilaba.
trisyllable, trisilabo.
trite, eluzita, malfreŝa.
triteness, eluzit'eco, malfreŝ'.
triturable, pist'ebla, polvig'.
triturate, to, pisti, polvigi.
trituration, pist'o-ado, polvig'o-ado.
triumph, a, triumfo.
——, **to,** triumfi; (rejoice), ĝojegi.
triumphal-ly, triumf'a-e.
triumvir, triumviro.
triumvirate, triumvirato.
triune, triunueca.
trivet, tripiedo.
——, **right as a,** bonstata, firma.
trivial-ly, trivial'a-e.
trivial, sensignifa, negrava.
triviality, trivial'eco-aĵo.
trivialness, trivialeco.
trocar (med.), trokaro.
trochaic, sepopieda, trokea.
trochee, trokeo.
trochlea (anat.), trokleo.
trod, paŝis, pied'iris-batis.
troglodyte, kavern'homo-loĝanto.
troll (myth.), gigant'o-ino, kavern-kobold'o-ino.
——, **to** (angling), suprajallogi; (roll), rul'i-iĝi; (sing), rondkanti.
trolley (contractor's), ŝutvagono; (pulley-arm), rulbrako.
trombone, trombon'o-a.

troop, trupo, anaro, amaso, bando; (animals), brutaro; (milit.), roto.
—— **together, to**, rot'iĝi, amas'.
trooper, rajdisto, kavaliro.
troops (men), viraro.
——, **mounted**, rajdistaro; (cavalry), kavalerio.
trope, tropo.
trophy, trofeo, venkosigno.
tropic, tropiko.
tropical, tropika.
——, **inter-**, intertropika.
tropics, tropik'o-lando.
trot, a, troto.
——, **to**, troti.
trotter, a (horse), trot'isto-ĉevalo.
troubadour, romancokantisto, poeto vaga, rapsodo.
trouble (annoyance), malplezuro; (care), zorgo; (disturbance of mind), maltrankvilo; (inconvenience), ĝeno; (misery), mizero; (pains), pen'o-ado; (sorrow), malĝojo; (vexation), ĉagren'o-ego; (worry), turmento.
—— **taken**, klopodo.
——, **to** (confuse), konfuzi; (disturb the mind), maltrankvil'igi-iĝi; (grieve), malĝojigi; (perturb), perturbi; (take pains), pen'i-adi; (waters), malklarigi; (worry), turmenti.
——, **to be at the**, klopodi.
——, **to put oneself to**, ĝeni sin.
—— **with, to**, zorgigi pri, ĉagreni pri.
——, **without**, senpene.
——, **worth the**, peninda.
troublesome, teda, enuiga; (inconvenient), maloportuna, embarasa, ĝena; (obtrusive), trudema.
—— **to, to be**, ĝeni.
troubling (perturbation), perturbo.
trough, trogo.
——, **washing**, lavtrogo.
——, **water-**, akvujo.
trousers, pantalono.
——, **wide**, larĝa pantalono, sakpantalono.
trousseau, vestaĵaro (edziniĝa).
trout, trut'o-a.
trowel, trulo.
——, **mason's**, masontrulo.
——, **plasterer's**, glat'igilo, eben'.
truancy, forkur'ado-eco.
truant, forkur'into-a.
truce, batalhalto, tempa paco.
——, **bearer of a flag of**, intersendito, pacflagportanto.
truck, ŝarĝvagono; (hand-cart), manveturilo.
——, **ballast-**, ŝarĝoveturilo.
——, **contractor's**, ter'transportigilo-vagono, ŝutvagono.
——, **flat railway-**, platvagono.
——, **to** (load), envagonigi; (swap), elŝanĝi.
truckle to, to, submetiĝi al.
truculence, sovaĝ'eco, kruel', barbar'.
truculent-ly, sovaĝ'a-e, kruel'a-e, barbar'a-e.
trudge, to, pezece (*or* lace, *or* malfacile) piediri.
tru'e-ly, ver'a-e, cert'a-e, maltromp'a-e; (accurate), ĝust'a-e, akurat'a-e; (faithful), fidel'a-e; (honest), honest'a-e; (just), just'a-e; (of fact), fakt'a-e; (sincere), sincer'a-e; (upright), rekt'a-e.
true (it is true), estas vera, vere.
——, **to establish as**, pruvi (*or* montri) vera, starigi (ion) kiel vera.
truing up, alĝustigo.
trueness, ver'eco, cert', sincer'.
truffle (bot.), trufo.
truism, familiara verajo.
trump (cards), atuto; (sound), trumpetsono.
——, **to** (cards), atuti.
——, **to over-**, superatuti.
trumpery, senvalorajo; (adj.), senvalora.
trumpet, trumpet'o-a.
—— **forth, to**, (for)trumpetadi.
——, **ship's**, ŝiptrumpeto.
——, **to**, trumpeti.
trumpet-like, trumpetforma.
trumpeter, trumpetisto.
trumpets, flourish of, brumuziko, trumpetsaluto.
truncate, to, senpintigi; (math.), sekci, tranĉi.
truncated, senpint'a-igita; (geom.), sekcita.
—— **cone**, hakita konuso.
truncation, senpint'ado-eco; (math.), tranĉ'o-aĵo.
truncator (geom.), sekcanto.
truncheon, bastonego.

trundle, to, rul'i-adi.
trundling, rulado.
trunk, kest'o-ego, vestkesto; (anat.), trunko, torso; (animal), rostr'o-eto; (block), ŝtipo; (coffer), kofro; (tree), trunko.
—— **of pyramid**, piramida stumpo.
——, **to pack in a**, enkestigi.
—— , **travelling**, vojaĝkesto.
trunnion, aksego; (artil.), klinakso.
truss, hernia bandaĝo; (bundle), fasko; (carpentry), rigida ĉarpentaĵo.
trust, konfido; (commission), komisio, konfiditaĵo; (credit), kredito; (fin.), trusto.
——, **in**, konfide.
—— **in, to**, konfidi al (*or* je).
——, **on**, kredite.
——, **to**, konfidi.
——, **to give on** (lend), pruntedoni.
trusted person, konfidato.
trustee, administranto; (for a minor), kuratoro.
trusteeship, administr'o-ado-eco, zorganteco; (for a minor), kuratoreco.
trustful-ly, konfidem'a-e.
trustworthy, fidinda.
trusty, fidinda.
—— **person**, fidindulo.
truth, ver'o-eco.
truthful-ly, verem'a-e, veresprim'a-e.
truthfulness, vereco.
try, a, provo; (football), trajo.
—— **one's patience, to**, provi (*or* lacigi) la paciencon (de iu).
——, **to** (by feeling), palpi; (examine), ekzameni; (judic.), juĝi; (put forth efforts), peni; (test), provi; (tempt), tenti; (verify), kontroli.
Tsar (*see* **Czar**).
tub, kuv'o-eto, tin'o-eto, bareleto, duonbarelo.
——, **wine-**, tineto.
tube, tubo.
——, **air-**, aertubo.
——, **drainage-**, elfluotubo.
——, **measuring-**, ampoltubo.
——, **sliding-** (phot.), lumŝirmilo.
——, **small**, tubeto.
tuber (bot.), tubero.
tubercle (anat.), tubereto; (med.), tuberklo.
tuberculosis, tuberklozo.
tuberculous, tuberkloza.
tuberose (bot.), polianto.
tuberosity, tuberaĵo.
tubular, tub'a-forma.
tuck, faldo.
—— **in, to**, envolvi; (eat), engluti.
——, **to**, faldi, en'faldi-volvi.
—— **up**, re'faldi, al'; suprenturni.
tucked up, suprenturnita.
Tuesday, mardo.
——, **on**, marde.
tufa, tofo.
tuft, tufo; (bundle), fask'o-eto; (crest), kresto; (hair), hartufo, vertharo; (tassel), kvasto.
—— **of wool, etc., for spinning**, porŝpinaĵo.
tufted, tufhava; (orni.), kresta.
tug (drag), fortotir'o-ado, tirego.
——, **to**, tiregi; (naut.), poste'trenitiri.
tug-boat, trenŝip'o-eto.
tuition, instruado.
tulip, tulip'o-a.
tulle, tul'o-a.
tumble, a, falo; (somersault), renversiĝo.
—— **down, to**, defali; (into pieces), disfali.
—— **head over heels, to**, rulfali, renversiĝi.
—— **on the side, a**, flankenfalo.
—— **out, to**, elrenversi.
——, **to**, fali; (somersault), renversiĝi; (to disorder), ĉifi.
tumble-down, ruiniĝanta.
tumbler (glass), glaso; (juggler), ĵonglisto; (of locks), altenanto; (pigeon), rulfalkolombo; (vessel), pokalego.
tumbril, ŝut'vagono-veturilo.
tumefaction (med.), ŝveliĝo.
tumefy, to, ŝvel'i-igi.
tumescent, tumoreca.
tumour, tumoro, ŝvelabsceso.
tumult, tumult'o-movo, bruego.
tumultuous-ly, tumult'a-e.
tumultuousness, tumulteco.
tumulus, tumuluso, tomba monteto, funebra tablego (*or* monteto).
tun, barelego.
——, **to**, enbareligi, verŝi en vazon.
tunable, agordebla, harmonia.

tune (accord of notes), akord'o-eco; (air), ario; (harmony), harmonio; (melody), melodio.
——, **out of,** malagord'a-e.
——, **to,** agordi.
——, **to be in,** agordiĝi.
——, **to be out of,** malagordiĝi, falstoni.
——, **to put out of,** malagordi.
——, **to sing in,** ĝustatone kanti.
—— **to, to,** malagordi.
tuned, agordita.
tuneful-ly, melodi'a-e, belkant'a-e, belson'a-e.
tuneless, senmelodia.
tuner (mus.), agordisto.
tungstate, tungstenato.
tungsten (chem.), tungsteno.
tunic, tuniko, ĵako.
tuning-fork, tonforketo.
tuning-key, kordstreĉ'ilo, agord'.
tunnel, tunelo, subtervojo, subtera galerio.
tunny, tonfiŝo.
tup, ŝafoviro.
——, **to,** suprensalti.
turban, turbano.
turbaned, turbanporta.
turbary, torf'ejo-rajto.
turbid, mal'klara-hela, densa.
turbidity, malklar'eco, malhel', dens'.
turbine, turbin'o-a.
—— **ship,** turbinŝipo.
turbot, rombfiŝo.
turbulence, malkvieteco.
turbulent-ly, malkviet'a-e, ribelem'a-e.
turbulent person, malkvietulo.
tureen, supujo.
